HUNGARA VIVO

E

1970 2



DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA BENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN“

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1970. X-a jaro, 2-a numero

L. Kökény: Kalocsay honorigita 1
K. Szakonyi: Laŭvorte. Tr. *L. Tárkony* 2
J. Szekeres: Panoramo 4
L. Tárkony: Revuo de revuoj 6
Reaĝintaj revoj sur la tornilo 7
S. Hemberger: Hungara arto en la kurento de la internacia kooperado 8
Dr. I. Szerdahelyi: E-o kaj la moderna lingvoscienco 10
V. Benczik: Morto de Šanek 12
M. Füst: Letero pri morto de Edipo. Tr. *K. Kalocsay* 13
A. Thewrewk: Por kio veturi surlunen 14
G. Vigh: Kuracado per akvo 15
Pál Barczi 16
Á. Dutka, S. Weöres: Poemoj. Tr. *P. Rados, K. Kalocsay* 16
L. Kökény: Esperanto en Hungario, 1945–1949 18
Diskuto 19
Nur por virinoj 20
O. Haszpra: Kvinkontinenta vojaĝo 22
G. Vigh: Niaj zorgoj hungarlandaj 23
L. Lesznai: Hungaraj muzikaj sukcesoj 24
S. Szathmári: La falsa aŭguro 25
Esperanta seminario apud Balatono 26
Domfabriko. Nia ex-libris-arto 27
Juneco, juneco! Humuro. 28
E. Fenyvesi: Béla Balázs 28
Leterkesto. Diversaj. 30
Krucvortenigmo. Filatelio 32

Sur la kovrilpaĝo: Generacioj — Foto de János Eifert

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan jaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la sesa horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54. Telefono: 224–819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

70.69255 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

K. Kalocsay honorigita de la hungara PEN-klubo

La prezidio de *la hungara PEN-klubo* donacis *al K. Kalocsay*, por esperantlingva diskonigo de hungaraj literaturaj valoroj, sian memormedalon „*Pro litteris hungaricis*", kreaĵon de la granda hungara skulptisto *Zsigmond Kisfaludi Strobl*. La transdono okazis ĉe Federacio de Hungaraj Verkistoj.

La solenaĵon prezidis *László Passuth*, romanverkisto, vicprezidanto de la hungara PEN. Ĉeestis multaj personoj, inter kiuj ni vidis la poeton *Károly Jobbágy*, la lingvoscienculon *László Gáldi*, la tradukartiston-eseiston *György Radó*, la medalkreinton *Zs. Kisfaludi Strobl*, aliajn hungarajn literatorojn kaj la gvidantajn esperantistojn.

L. Passuth en sia varmtona prezida enkonduko, memoris pri tio, ke ĝuste en 1911, kiam Kalocsay esperantistiĝis, ankaŭ li renkontiĝis kun E-o en Kolozsvár (Cluj) kaj de tiam — li diris — li alte estimas la E-movadon kun ĝia celo forigi interpopolajn limojn.

La distingiton prezentis, kiel PEN-membro, nia ĉefredaktoro *Mihály Gergely*. Enkonduke li atentigis pri la escepteco de ĉi tiu distingo, ĉar ĝis nun ĝin ricevis nur alilandanoj pro sialingva interpreto kaj konigo de hungaraj verkoj, kaj Kalocsay estas la unua hungaro elmeritinta ĉi tiun honoron per la uzo de E-o kiel traduklingvo. Li skizis la literaturan agadon de Kalocsay, kies nomo de lingvoevoluiganto kaj lingvokulturanto estas kune menciata kun la lingvokreinto Zamenhof. Li parolis pri liaj tri ĉefaj tradukverkoj el la hungara poezio: „La Tragedio de la homo" de Madách (1924 kaj 1965), la poezia parto de „Hungara Antologio" (1933) kaj la esperantlingva Petőfi-poemaro ĉi-jare eldonota de *Corvina*. Pri la „Tragedio" li citis la opinion de *György Radó*, kiu, en sia ampleksa traktato pri ties diverslingvaj tradukoj, vicigis la tradukon de Kalocsay inter la plej sukcesajn kaj fidelajn. Li menciis ankaŭ la tradukojn de Kalocsay el aliaj lingvoj (Eterna Bukedo, Baudelaire, Dante, Heine, Shakespeare).

Sekvis deklamo de *Zoltán Sellei:* li prezentis poemojn de Petőfi, Árpád Tóth kaj Gyula Illyés en Kalocsay-a traduko kaj fine ĉarman poemon hungarlingve; ĉi tiun poemon de la pola N. Zmichowska el la E-a traduko de Grabowski tradukis Kalocsay en la hungaran. Poste la ĉambra ĥoro de *Rita Barabás* kantis de Palestrina kaj Neubach kun teksto E-a (trad. de Kalocsay). Ĉi tiuj kontribuaĵoj donis intiman etoson al la solenaĵo; L. Passuth en sia ferma parolo rimarkis, ke li apenaŭ memoras pri antaŭa PEN-kunveno tiel agrable kaj varme harmonia. Fine la ĉeestantoj transformiĝis en babilantan societon.

La distingito, K. Kalocsay, dankinte kortuŝite por la honorigo, atentigis pri tio, ke en la Internacia PEN-kongreso tenata en 1934 en Budapeŝto, *Frigyes Karinthy*, la eminenta hungara verkisto, proponis en sia franclingva alparolo, ke PEN utiligu E-on, dirante inter aliaj: „Neŭtralan lingvon ni bezonas, kaj kiel tia, E-o estas la plej taŭga, vaste uzata. Mi proponas, ke PEN okupiĝu pri la E-movado kaj komencu kun ĝi kunlaboron." Samtempe, raportante en hungara ĵurnalo pri la PEN-kongreso, li priskribis la egan lingvo-konfuzon inter ties 400 partoprenantoj. „Mi ne scias, — diris Kalocsay, — ĉu iu de tiam faris ian paŝon ĉe PEN, sed nun al mi ŝajnas, ke ĉi tiu distingo, krom la granda honoro donita al mi persone, estas samtempe ankaŭ dono de unu aproba voĉo de la hungara PEN favore al la 36 jarojn antaŭa propono de Karinthy."

Efektive, ĉi tiu honora distingaĵo, estas de grava signifo. Ĝi montras, ke literatora korporacio rigardas Esperanton la Internacia Lingvo, kaj krome kaj precipe, ke tiu aŭtoritata tribunalo rekonis, ke Esperanto estas instrumento perfektigita por plezuriga reprodukto de poezia belo.

Lajos KÖKÉNY

Károly Szakonyi

LAŬVORTE

...do kaj poste tiom da aveloloj al li estis, ĉiom da aveloloj, kaj diris la kapreolo kaj la onjo... kaj la onjo diris al la kapreoleto, ke vidu, ĉio ĉi tio kreskis al vi, ĉi tiuj multaj aveloloj, kaj ŝi montris en la antaŭku... en la antaŭ... antaŭku... antaŭtu... antaŭtuko.

— Ve, iom malpli laŭte, Buĉjo, ĉu vi aŭdas? Ni estas sur aŭtobuso, iom malpli laŭte.

— Mi fabelas nur pri la aveloloj, mi nur pri ili. Hu! Vidu, kiel granda flava balailo! Seso, sepo, oko, kvino... Ĉi tiuj floroj ĉiuj trovis la museton, sed ĝi ne foriris, ĉar en la aŭto mankis loko, kvino, seso... kial la ruĝa estas ruĝa?

— Ne kantadu, fileto. — La viro glitis sur la sidejo for de la man- kaj piedgestado de la infano. — Kaj ne kotumu mian jakon! Jen. Oni nun volu lin aŭdi plaĉe; de kiam li vizitas infanĝardenon, konstante li kantas. Ĉion li diras kantante.

— Ege granda li kreskis, la baptaneto — ridetis alia viro apud la sidejo. Per unu mano li kroĉteniĝis, per la alia li premis al si pak-reton, paperpakaĵojn. — Mi nur rigardas, ĉu mi ne devas jam descendi? Ĵustempe mi veturis plù du haltejojn. Pro la fenestro. La fenestron kovras glacio.

— Jes — kapbalancis la viro premiĝanta apud la infano. — Tiatempe, en vintro...

— Nuraj glacifloroj.

— Bonan grandan vintron ni havas. Mi diris ja ankaŭ ĝuste hodiaŭ, kiom estas da neĝo!

— Monstra amaso da neĝo, poste estiĝos koto kaj flakoj kaj ĉio tia.

La infano gratadis la fenestron: Hu! Kiel grandaj katoj! Kaj kiel granda kukumo! Kuku, kuku, kukuĉjo, Luĉjo. Li kuras al la kino, al la kokino, al la kokino, al la kukino, al la... al la... al la ventreto, al la fiŝreto... kaj vespere lia panjo diras, ke li amas la kukon, ĉar se li ne amas la kukon, ĉiuj musoj kaŝas sin en la arboj kaj li ne povas vidi la kukon...

— Ĉu vi bonvolas ankoraŭ labori tiuloke? — demandas de la sidejo la viro. Li suprenrigardas al la figuro klopodanta pri siaj pakaĵoj. — Volu meti ĉi tien tiun grandan pak-reton. Mi ĝin tenos.

— Ho ne, neniel! Povus elverŝiĝi la lakto kaj mi mem ne scias, kio estas en ĝi malsupre.

— Ĉu vi bonvolas labori ankoraŭ tiuloke? Ve, Buĉjo, iom pli mallaŭte, paĉjo ne povas konversacii.

— Lasu, lasu! — diras la viro el post la pakaĵoj. — Plena portreto de paĉjo, ĉu ne?

— Ho ne, plena portreto de sia patrino. La knaboj pli similas sian patrinon..—

— Nu, okazas, ke ili similas la patron.

— Malofte. Prefere la knabinoj.

— Ĉu vi havas ankaŭ knabinon? Mi ne sciis ja tion... — Li genuflekse elgvatas tra la busa fenestro super la glacifloroj. — Ne, ĉi tio estas ankoraŭ nur la hospitalo. Kiam naskiĝis la knabino?

— Ekzistas nur li, Buĉjo, nur la knabeto. Ne ekzistas knabino. Ĉu vi volas descendi ĉe la angulo?

— Ne, unu haltejon pli diste. Ekde la angulo mi havus longan vojon.

— Ni descendos ĉe la angulo.

— Ĉu jes? Tie ĉe la angulo?

— Vidu paĉjo, tie estas sorĉistino! Granda lila sorĉistino! Ŝi forportis la kofron, sed la feinoj forprenis ĝin de ŝi, ĉar ĝi estis plena de kukoj kaj tial ili ĝin forprenis, ĉar juste ili ĝin forprenis... Kiel granda aŭto, ĝi vojas kurbe, turbe, kukurbe, tuturbe, tri, ok, dekunu...

— Kiel lerte li kalkulas — ridetis la viro. — Kiom li aĝas?

— Tri kaj duonon. Nun li fariĝas tri- kaj duonjara en januaro. Sekve vi bonvolas labori ankoraŭ tiuloke?

— Ne, mi jam foriris de tie.

— Ĉu la nuna loko estas pli bona?

— Pli per ducent forintoj. Plus premio. Kaj nur ekde la naŭa ĝis la tria. Krome mi povas eliradi en la urbon.

— Kaj ĉe ni estas libera sabato... Buĉjo, vi makulas vin malpura!... Mi estas ankoraŭ samloke, ĉar, ĉu ne, la libera sabato... Ĉu vi bonvolis vidi la matĉon en la televido?

— Ho ve, eĉ ne unu vorton pri tio! Sed ili elmeritis tiujn tri golojn, ĉar ili estas plumbokruraj! Plumbokruraj, tion diras mi! — La aŭtobuso balanciĝadas sur la frostiĝinta vojo, la vojaĝantoj interpuŝiĝadas. — Fantaste! Amasego da veturantoj. Mi vere ne komprenas. Matene tropleno, tagmeze tropleno, vespere tropleno...

— Nur nokte ne.

— Nokte ne iras la aŭtobuso.

— Tial mi diris tion...

— Kaj la kato elvenis kaj diris, ke vi ĉiuj estas manĝitaj. Ĉiujn manĝis la lupo, la porkidetojn. Kaj li ne estis scivola pri la televido, ĉar li ĝin elŝaltis kaj diris, mi estas scivola pri nenio. Kaj la neĝkolomboj ĉiuj kantis, ĉar li estis la reĝo kaj la reĝo ne povis manĝi kukon, ĉar li estis punita...

— Jen la hospitalo, se mi bone vidas — elgvatis la viro. — Ĉu vi bone statas tie?

— Diablo scias! Onidire la salajroj fariĝos pli altaj je la unua, sed ĉu tio estas vera? Ve, bonvolu vin gardi, tuj ŝiriĝos la ŝnureto. Ĉi tiuj multaj pakaĵoj, ĉu ne? Festoj! Se mi nur scius por kio? Amasego da mono. Ĉiam nur la mono!

— Da ĝi estas plej malmulte — flankentiris la viro la buŝon. Li ordigadis siajn pakaĵojn, snufadis. — Laŭdire oni povas ricevi Volkswagen, *nur oni devas ĝin pagi kontante. Centmil.*

— Troviĝas, kiuj ĝin aĉetas.

— Mi jam nur ridegas. Laŭ mia edzino plej bone estus iradi nude, ŝiradi de arboj la fruktojn...

— Ĵus mi legis en la gazeto pri io. Mi pensas, ke pri filmo. Certa viro tediĝas de la tuto kaj foriras.

— Kien?

— Al Tahiti.

— Bone al li.

— Ĝi estas nur filmo

— Nu, kompreneble.. Ankaŭ la oranĝoj! Mi aĉetis du kilogramojn.

Kion aĉeti por mia bopatrino? Unu kvindeko.

— Ĵustempe mi manĝis karobon.

— Ĉu vi ĝin aĉetis?

— Ne, mi ĝin manĝis.

— — Granda Dio! Ĉu vi scias, kiam mi ĝin manĝis laste? Mia patrino ĉiam aĉetis ĝin en la Helera Vendohalo.

— Oni ĝin enportis. El Vieno. Tie ĝi ankoraŭ troviĝas.

— Ho, ho! Mi eĉ ne memoras pri ĝia gusto.

— Kaj la nigra kato estis la plej granda nigraĵo en la tuta nigraĵo. Do, je tio la sorĉistino diras, ke mi ne povas eliri al la strato, ĉar mi manĝos ja vin ĉiujn! Per avelolo. Mi ŝutos sur vin la avelolojn el mia antaŭtuko kaj hamm! hamm! HAMMM!

— Buĉjo! Restu do trankvila! Ĉu vi memoras pri la Helera Vendohalo. Ĝi estis sur la placo Baross. Oj, oj!

— Sed iel vi nun bonvolas aspekti pli bone. Lastfoje vi estis tia kielmidiru . . .

— Nu, post la operacio. Jes, Mi malgrasiĝis dekkvin kilogramojn.

— Dekkvin kilogramojn! Tio estas multa. Jes, multa.

— Nu jes, kion fari? Sed mi eĉ ne bedaŭras tion. Mi komencis trograsiĝi.

— Ho ne, vi bonvolas esti sufiĉe longa por tio.

— Sed vi scias, la ventrodiko . . . La knabinoj ĝin ne amas.

— Alvorte! Ĉu ankoraŭ tie laboras tiu blonda . . . nu! Ilnjo!

— Ĉu vi ŝin konis? — La viro ridetis post siaj pakaĵoj. — Ĉu vi scias, kio al ŝi okazis?

— Oni manĝis! Hamm! Kaj la diablidoj manĝis la neĝomontojn kaj la neĝhomoj ĉiuj ploris kaj eliris en la tombejon kaj oni formordis al li la manon kaj la orelon kaj je tio diris la ursido, la . . . la . . . kunsido kaj la ursburso kaj la bursurso . . . la okurso kaj la dekurso . . .

— Kio al ŝi okazis, ŝi estis tre plaĉa virineto.

— Nu, jen ĝuste ĉi tio. Ĝislaste, la tuta ĉefsekcio, tie . . . vi komprenas ja? Poste jam estis tiel, ke ŝia sekciestro ŝin edzinigos, sed estis granda skandalo, anonimaj leteroj, vi scias ja . . .

— La urso kaj la kukurso kaj la kukurbo kaj la ursurbo . . . kaj kial la karoto ruĝas kaj kial la lampo ruĝas kaj kial lia nazo ruĝas . . .

— Ve, mi jam devas descendi! Do agrablajn festojn kaj ĉion bonan . . . kaj se vi preteriros tie, proksime al ni, sinjoro doktoro . . . Bonvolu, mi petas, signali tie . . . Ne puŝadu min, mi jam descendas, ĉu vi ne vidas? Nu! . . . Se vi iros preter ni, sinjoro doktoro . . .

— Kompreneble, kompreneble. Voko telefona, ĉu ne? Ĉu bone? Kaj ankaŭ mi ĉion bonan, sinjoro inĝeniero, mankisoj al via kara . . . Buĉjo, Buĉjo, fileto, ne leku la fenestron. Ĉu vi ne aŭdas?!

— Kaj ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj, bummm! bummm! Ili elkuregis kaj dispafis kaj disŝiris ĉion kaj kriis bummm! kaj ili tute disŝiris la sorĉistinon kaj la neĝohomoj disŝiris okcent kaj mil milionojn da aveloloj . . .

— Lasu jam tion, fileto. Ĉiam tiuj multaj stultaĵoj, fileto! Ni estas sur aŭtobuso, kion diros la oĉjoj kaj la onjoj? Ili aŭdas de vi la multajn stultaĵojn! Ili kredos, ke vi estas stulta knabeto. Ĉu vi tion ne komprenas?

Tradukis: Lajos Tárkony

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo



Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informilon sendas la Pasagâerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Telefono: 189—900/160

panoramo·panoramo



Pri Ignác Semmelweis, pri la granda hungara kuracisto de la pasinta jarcento, kiu malkovris la kaŭzanton de la akuŝlita febro, verkis dramon la norvega Jens Bjoerneboe. La teatraĵon kun granda sukceso oni prezentis en la urbo Oslo kaj en la finnlanda urbo Abo. Kelke da teatroj interesiĝas pri la dramo, laŭfame ankaŭ en Vieno oni pripariĝadas por la prezentado de la verko.

*

La nombro de FAO-membroŝtatoj atingis jam 120 post la aliĝo de Ĉehoslovakio kaj Sudjemena Araba Respubliko. Oni decidis dum la pasintjara kunsida periodo de FAO., ke ili provos fari planon por la agrikulturo de la mondo, por la sekvontaj 15—20 jaroj. Oni organizos en tiu ĉi jaro la eŭropan regionan konferencon de FAO en Budapest. La eŭropa forumo de la plej granda specialigita organizo de UNUIĜINTAJ NACIOJ unuafoje kunsidos en socialisma lando.

La komerca entrepreno HUNGEXPO en la organizo de eksterlandaj ekspozicioj en la jaro 1970 atingos rekordajn nombrojn: *en 42 ekspozicioj prezentos sin la hungara industrio.* El inter ili 14 okazos en transmaraj landoj, en Afriko kvarloke organizos ekspoziciojn la HUNGEXPO. Pasintjare en tri, — ĉijare jam en ses urbegoj oni aranĝos hungarajn semajnojn, nome: en Bazel, Bordeaux, Bologna, Athen, Moskva kaj en iu hinda urbo.

*

Mi interparolis kun Prof. Jules Francois, *prez. de la Belga Reĝa Med. Akademio. — Sinjoro profesoro, — mi demandis, — viaj esploroj etendiĝas tra la tuta okulmedicino; kia vi opinias la evoluon de ĉi tiu scienco?*

— Mi estas plena de fido: ĝi progresas gigant-paŝe. Ni elkuracas okulmalsanojn, kies sanig-eblecon ni eĉ ne esperis antaŭ 15—20 jaroj. Elkreskis nova generacio de scienculoj. En mia kliniko pluraj eksterlandaj stipendiuloj — ankaŭ hungaroj — faras laboron esploran kaj kuracan; iliaj belaj rezultoj konfirmas la utilon de internacia kunlaboro.

— La Med. Universitato Semmelweis en Budapeŝto, je sia 200-jara jubileo, elektis vin sia honora medicinisto, kiu akiris netakseblajn meritojn en la interproksimigo de sciencfakuloj el landoj de diversaj sociaj sistemoj. Kiel vi prijuĝas la nunan situacion de tiu scienca interproksimiĝo?

— Miaopinie, ni iras ĝustan vojon. La scienculoj diverslandaj ne ŝparas sian forton en tiu ĉi afero. Pri tio bonega ekzemplo estos la kongreso de Internacia Eŭropa Oftalmologia Asocio aranĝota Budapeŝte en 1972: ĝi promesiĝas eksterordinare riĉrezulta laŭ miaj ĉi-tieaj spertoj.

r.k.v.

La hungara-sveda var-interŝanĝo duobliĝis en la pasintaj dek jaroj. Fine de januaro oni aranĝis en Budapeŝto svedan teknikan semajnon. Dum kvin tagoj la reprezentantoj de 220 svedaj entreprenoj konigis en 38 prelegoj la rezultojn de la diversaj ekonomiaj teritorioj kaj la modernan svedan teknikon.

*

Komisiitoj de la hungara financministerio kaj de Usonaj interesatoj subskribis interkonsenton pri la *kvitigo de la komercaj ŝuldoj*, kiuj restis nesolvitaj ĉe la milit-eksplodo. Per tio la tuta debet-postulo, kiun Usonaj bankoj havis kontraŭ hungaraj bankoj, estis kontentigitaj.

*

En Bejrut aperis la araba traduko de la verko de hungara aŭtoro Imre Madách, kies titolo estas „La tragedio de l'homo." La laboron de la tradukado faris — kun la helpo de hungara profesoro Gyula Germanus — la konata jordana verkisto kaj tradukisto Isa An Naouri.



panoramo·panoramo

panoramo



Por la ekspedo de centmil broditaj bluzoj kaj infanvestoj ricevis eksterlandajn mendojn en la vilaĝo Mezőkövesd la Matyó (Matjo) Domindustria Kooperativo. La anoj de la kooperativo jam komencis brodi por Japanio, Francio kaj Kanado la modsaketojn, kiuj estas farataj el felta kaj leda bazmaterialo.

*

En Tokio, en la Ŝtata Ochaummicu Universitato en la pasinta aŭtuno oni enkondukis la instruadon de la hungara muziko kaj edukado. La sciigon Ruriko Kasé, la sekretario de Tokia Muzika Societo kaj la Instruanta Societo de Kodály (Kodalj) Metodo, komunikis al „Kulturo" Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno, kiu liveras la necesajn lernilojn.

*

Oni organizos en Budapest internacian industriekonomian konferencon en la Hungara Scienca Akademio.

La renovigo de la Liszt-domo *en la urbo Weimar finiĝis. Ĉi tie pasigis la lastajn jarojn de sia vivo Ferenc Liszt la komponisto.*

*

Por produktado de *nukleaj instrumentoj* sin establis la eksperimenta, esplora kaj automatiza uzino de la Ercmineja Entrepreno de Mecsek. La instrumentoj specialaj estas bezonataj ĉe la uran-ekspluatado en la minejoj de Mecsek; ili havis sukceson en pluraj internaciaj ekspozicioj.

*

„American Management Association", grava organizaĵo de Usonaj negocistoj, aranĝis Hungaran Tagon *en* Washington. *Ĝi faris antaŭe tritagan seminarion pri tio, kiel evoluigi la komercon inter Oriento kaj Okcidento. En la Hungara Tago oni tenis prelegojn pri la perspektivoj de la nova kvinjara plano de la hungara popol-ekonomio kaj pri la evoluig-eblaĵoj de la ekonomiaj interrilatoj.*

En la optika laboratorio de Centra Fizika Esplorinstituto oni komencis en 1963 eksperimenti per la lasero. La esploristoj malkovris novajn proprecojn de la elektronoj eliĝantaj sub la efiko de la lasera radio, kaj tiujn trovaĵojn publikigis la unuaj en la mondo. La Laboratorio faris kunlaboran kontrakton kun la Hungaraj Optikaj Uzinoj (MOM) por la industria aplikado de la! aseroj, kaj baze de tiu kontrakto oni ellaboros la laserajn instrumentojn optikajn kaj geodeziajn de MOM.

La esploristoj havas la konvinkiĝon, ke male al la antaŭaj hipotezoj, la lasera radio havas sian futuron ne kiel »mortradio«, sed kiel rimedo de elektroniko, unuavice en la komunikado de informacioj, en la regulado kaj en la tekniko de mezurado.

*

Tridek kvinmil fotoj alvenis por la internacia fotokonkurso de filmfabriko ORWO kaj fotoaparat-fabriko Pentacon. El la 274 premioj gajnis kvardek kvin premiojn la hungaraj laŭreatoj.

La ĉefa merkato de la hungaraj bicikloj estas Sovetunio, sed ankaŭ Francio, Kanado, Nederlando, Usono kaj aliaj landoj aĉetas konsiderindajn kvantojn el la bicikloj. La grandan interesiĝon klarigas tio, ke la biciklofabriko en Budapeŝt-Csepel kontentigas rapide kaj elaste la pretendojn de la internacia merkato. Ekzemple la fabriko komencis produkti la serĉatajn *Cowboy*-biciklojn kaj la falde kunfermeblajn biciklojn.

*

La Internacia Prilaborinforma Federacio petis Hungarion pri la aranĝo de la tria internacia elektronika indikprilabora seminario. Oni organizis la unuan seminarion en Romo, la duan en Londono. La Budapeŝta seminario okazis en la dua parto de la pasinta jaro, en kiu partoprenis junaj fakuloj, kiuj finis la klasojn de la universitato en la landoj de Bulgario, Ĉehoslovakio, Egiptio, Ghanio, Hindio, Kubo kaj Polio. La junaj fakuloj antaŭ la fino de la seminario faris raporton pri la ellernitaj studobjektoj antaŭ ekzamena komisio.

panoramo

Lajos Tárkony

Revuo de revuoj

Tajpante ĉi tiujn liniojn, dum antaŭ miaj okuloj defilas en mia imago la tuta legio de la Esperantaj periodaĵoj, mi ĉiam havas la esperon eble iom naivan, ke en la gazetoj, kiujn mi karesis (ĉu laŭ, ĉu kontraŭ la haroj), mi trovos pli aŭ malpli poste ian reagon de iu menciito. Mian esperon mi povas pravigi ankaŭ per proverboj, ekzemple: ,,Unueco donas forton'', ,,Servo postulas reciprokan servon'', aŭ — simple kaj vulgare — ,,Mano manon lavas''. Sed ĝis nun mi devas konstati, ke miaj manoj estus ege malpuraj, se mi devus ilin konfidi al tiu reciproka lavado. Tamen, naiva espero estas neekstermebla, kaj instigas min je plua revuado.

La unuan lokon mi rezervas al la simpatia entrepreno de japanaj medicinistoj-esperantistoj, kiuj eldonas en Tiba, en la tiea I. Fiziologia Instituto, Medicina Fakultato, la gazeton INTERNACIA MEDICINA REVUO, kiel sendependan diskutejon de tutmondaj medicinistoj. Provizore ĝi aperas bedaŭrinde nur dufoje jare. En la lasta numero troviĝas la statuto de ,,Universala Medicina E-Asocio'' (UMEA) kaj grava studo pri medikamento dilatanta (plivastiganta) la bronkojn, speciale pri la interrilato de ties bronko-dilata kaj struktura aktivecoj. Krom tiu alta-scienca artikolo, la revuo havas ankaŭ plurajn facilajn interesaĵojn pri orienta medicino, pri ,,Arbo de Amikeco'', pri unusola vermo mortiganta homon, pri la senila cerbo kaj similaj. Tiamaniere ankaŭ nemedicinisto, abonanta la revuon nur por ĝin subteni, povas trovi en ĝi ion legindan.

La sensacio de Esperantujo aŭ — kiel la francoj diras — ,,la evangelio de la tago'', estas tiu batalo, kiu eksplodis inter HEROLDO DE ESPERANTO kaj ESPERANTO de UEA. En la novembra numero de ĉi lasta aperis sur la du mezaj paĝoj speco de parodio pri HEROLDO kun kelkaj flankbatoj al IOE. Kvankam oni sentis, ke la kreinto de tiu parodiaĵo estas ankoraŭ komencanto en sia nova metio, tamen en pluraj lokoj oni, ne povante subpremi rideton, rememoris pri la schwartzaĵoj de ,,Pirato''. Estas plene kompreneble, ke tia ŝerco aŭ moko aŭ ironio, aŭ dio scias kio, malpleje plaĉas al la koncernato. HEROLDO tamen bridis la impeton de sia reago kaj aperigis prie nur kurtan noton, en kiu mi trovis tre plaĉa la dignon, malmulta la spicon. Sed la batalo eksplodis *ĉirkaŭ*, la du gazetoj: inter la esperantistaro. Pri ĉi tiu tempesto (jam ne en glaso, sed en barelo da akvo), nin sciigas la januara numero de E. de UEA, kiu kun rimarkinda objektiveco publikigas krom la aprobaj, ankaŭ la malaprobajn, akre kondamnajn reagojn. Mi kompreneble estas malgranda punkto por preni partion aŭ provi decidi en tia tikla demando, do mi kuraĝas komuniki nur tiun mian psikologian sperton, ke tiklato kutime ridas, kaj tiun saĝon iam aŭditan, ke humursento estas diobeno.

En la HEROLDO de 16. januaro mi trovis plaĉa la raporton pri la Zamenhof-tago tra la tuta mondo, kaj bone estis rigardi la bildon kun la esperantista ŝtatprezidanto, doktoro Franz Jonas. Interesa estas la ideo de SEK, Zagreb, Jugoslavio: kiel senenuigi la esperantistan vivon societan per la roligo de teatro, pupteatro, konataj kanzonistoj, famaj prelegistoj. En Zagreb oni faris tre bonajn spertojn pri tio; ni scias ja, ke tie de jaro al jaro kunvenas pupteatroj de la socialistaj landoj kaj faras prezentadojn esperantlingvajn. — Mag. *I. Dratwer* skribis pri la milito daŭranta kontraŭ la Fundamento kaj esprimis sian timan zorgon pri tio. La cititaj ekzemploj tamen estas simplaj gramatikaj eraroj, re- kaj re- aperantaj ekde kvindek jaroj kaj tamen ne renversantaj la Fundamenton. Mia modesta opinio estas, ke ĉiu esperantisto (escepte de redaktoro) havas plenan rajton fari gramatikajn erarojn; la malbono komenciĝas nur tiam, se iu volas fari el siaj eraroj regulojn. (Ankaŭ tio okazis, sed la altestimata letersendinto ne protestis tinokaze).

El la revuo PACO kuŝas antaŭ mi la Vjetnama eldono por 1969. Estas malfacile skribi pri ĉi tiu numero pro sentoj de kortuŝo pri viktimoj kaj herooj, pro sento de abomeno kontraŭ la kaŭzantoj de tiom da sufero, detruo kaj pereo de tiom da karaj, diligentaj, viglintelektaj popolanoj. Sola konsolo por mi estas, ke neniun landon, neniun nacion kiel tuton oni povas akuzi pri tiuj hidaj teruraĵoj. Jen ĝuste en tiu ĉi numero abunda cito el usonaj poetoj esprimas ilian justan koleron kaj jen estas legeblaj la brulstampaj vortoj de prof. Richard A. Falk, de d-ro Joseph H. Crown kaj de d-ro Benjamin Spock.

Pri KOMUNA ESPERANTO GAZETO mi jam skribis laŭdajn vortojn en iu mia Revuo. En la decembra numero mi trovis ion diskutindan en la artikolo de *G. J. Degenkamp* pri ,,Libera lingva evoluo''. Li skribas tie, ke Kalocsay eksperimentis per ,,estiel'' apud *kiel* por diferencigi la realon de la nerealo. Tamen al mi ŝajnas, ke li miskomprenis la intencon de Kalocsay: *estiel* estas uzata por indiki realon, do ,,Adamo estiel faraono'' ne signifas, ke Adamo similas al faraono, sed ke li en tiu sceno efektive estas faraono. — En ,,Iom pri la prononco'' li mencias la kurioza-ĵon, ke iam la esperantistoj prononcis ĉiun vokalon longe, tire, jene: éésppéérääntóó. Poste li skribas: ,,Kelkaj lernantoj el Cseh-kursoj poste klopodis enkonduki regulon, laŭ kiu oni plilonge prononcu la akcentitajn silabojn: tio preskaŭ same ridinde impresis, kiel la antaŭa tirtona elparolo.'' Leginte ĉi tiujn liniojn komence mi preskaŭ kolapsis pro konsterniĝo, konsciante, ke ankaŭ mi mem plilonge prononcas la akcentatajn silabojn, sed poste mi trankviliĝis, ĉar mi konsoladis min: se tia elparolo estus ridinda, multfoje mi jam estus laŭtege priridata, kiel oni estus priridinta ankaŭ mian amikon Baghy, kiu ĉiam parolis sammaniere, eĉ li estis unu el tiuj Cseh-instruistoj, kiuj insiste instruis, ke la akcentaj vokaloj, se ilin sekvas malpli ol du konsonantoj, estas prononcendaj pli longe, escepte la dusilabajn pronomojn (mia, tiu k. t. p.). Tiamaniere li parolis ankaŭ en la malferma kunsido de la budapeŝta kongreso, kaj lia prononco vekis ne ridon, sed sinceran emocion kaj grandan ovacion.

Realiĝintaj revoj sur la tornilo

Károly Gellért seruristo, per kelkaj genie simplaj maŝinelementoj, sorĉis nova la bonan, oldan, de centjaroj konatan torno-maŝinon. Kio ĝis nun ŝajnis neebla, pri tio li sukcesis: lia maŝino tornas aksojn plurangulajn.

La nova hungara invento revoluciigas la tutan nunan sistemon de la interligo de maŝin-elementoj. ĉar por la interadapto oni ne bezonas termikan manipuladon. Ĉiu ajn tornisto povas facile ellerni la manuzon de la maŝino: oni nur devas turni kelkajn kuplilojn laŭ donita tabelo, kaj jam la maŝino tornas la deziratan aksoprofilon.

Post la tago de prezento de la inventaĵo (16. II. 1967), la fakuloj de Okcident-Germania fabriko



Profiloj faritaj per la tornomaŝino de Gellért



Jen kion ĉian la tornilo de Gellért scias fari

Renaskiĝis la tradicia torno-maŝino, kaj per tio venis fino al la regado de la ronda-sekcaj aksoj: per la maŝino de Gellért, sub ties tornotranĉilo, facile elformiĝas aksoj de sekco elipsa, triangula, kvarangula, sesangula, naŭangula, dekdu-angula, dekok-angula.

La maŝino laboras kun tia sama surfaca fajneco kaj precizeco kiel la kutimaj torniloj. Ankaŭ la arkeco de la lateroj de l'plurangulo, la turniĝ-angulo de la aksosekco kaj ĝia grado de konuseco estas variigebla. La perspektivoj de la invento estas netravideblaj. De nun, tablaj bormaŝinoj, premo-maŝinoj, turnilaj aksoj de Dizelmotoroj, moviloj de tornomaŝinoj povas esti fabrikataj per la Gellért-profilaj aksoj. Kaj poste, la aksoj de nova sekco povas aperi ankaŭ en la interno de pli grandaj il-maŝinoj, eksplod-motoroj kaj argan-moviloj. Ili estas uzeblaj ĝenerale en ĉiu interligo fiksa aŭ dismetebla. Ili estas pli malkaraj ol la ŝrumpligo, vizitis la inventinton la unuaj, poste, en majo 1969., la interesiĝantoj povis vidi la ekstre specialan tornilon en la Inventaĵa Pavilono de Budapeŝta Internacia Foiro. La fakuloj ĝin admiris kiel teknikan kuriozaĵon. La Inventaĵ-disvenda Entrepreno ,,Licencia'' montris la inventaĵon de Károly Gellért ankaŭ en la 23-a Mondekspozicio de Inventaĵoj en Nürnberg, en novembro 1969. Ne la maŝinon mem, sed la strangformaĵn akso-profilojn, kiuj frapis per miro la eksterlandajn ekspertojn. Jam ĝis nun 17 eksterlandaj firmoj interesiĝas pri la inventaĵo; niaj enlandaj entreprenoj ŝajne restis malantaŭe, kvankam la fabrikado de la speciala torno-maŝino promesas eksterordinaran sukceson en la mond-merkato. La maŝino ne nur ,,scias'' ĉion, kion la tradiciaj torniloj, sed krome ĝi faras ankaŭ dek kvar specojn de akso-profiloj, kaj ĉi tiujn surtornas ankaŭ al surfacoj ŝraŭbliniaj aŭ konusaj.

G. F.

Sándor Hemberger

La Hungara arto en la kurento de la internacia kooperado

Unu el la karakterizaĵoj de nia epoko estas la neniam antaŭe vidata dinamiko de la internacia kooperado: la interrilato de la landoj plistriktiĝis kaj ricevis ankaŭ novan kaj noblan enhavon. Oni povas kompreni, ke ankaŭ en la mondo de la tekniko kaj komputeroj, la kulturo havas en la interrilatoj altrangan rolon, parolante al ĉiuj kaj atingante ĉiujn kun sia estetikeco, varia aspekto kaj komuna kompreneble co.

Ankaŭ la hungara kulturo pliriĉigas la kalendaron de la internacia kultura vivo: inter la partoprenantoj kaj aranĝantoj de festivaloj, bi- kaj trienaloj, kongresoj kaj konkursoj troviĝas la plej eminentaj reprezentantoj de nia spirita vivo. Nia lando ligis kulturan kaj sciencan interkonsenton kun 60 landoj kaj per tio en ĉiuj kampoj de la kulturo (sciencoj, literaturo, muziko, teatro, filmo, belartoj) ĝi estas konektita en fekundiga kooperado.

Ĉi-foje ni ellevas el la riĉa trezorejo de la kulturo la interrilatojn de la figurantaj artoj: ni parolos pri tio, kiel ni partoprenas en la sangocirkulado de la mondo per la plej ofta manifestiĝado de ĉi tiu artospeco: per la ekspozicioj.

Ĉi-teritorie precipe la lastaj jaroj alportis intensan, plifreŝigan moviĝadon. Kreskis la intereso pri la rezultoj de la orienteŭropa arto, kaj — interne de la artospecoj — komenciĝis ankaŭ diferenciĝado laŭ tekniko kaj stiltendencoj.

Venecio, Parizo, Sao-Paulo, Tokio, Krakovo, Ljubljano, Lugano, Varsovio, Lausanne, Faenza, Nürnberg, Jablonec, Delhi kaj ankoraŭ pluraj urboj donas sisteme hejmon al signifaj bel- aŭ industriartaj internaciaj periodaj ekspozicioj. Kaj la hungaraj artistoj estas bonrezultaj partoprenantoj de ĉiuj signifaj ekspozicioj, kiel tion montras premioj, rekonaj diplomoj, denovaj invitoj, atestantaj, ke la nunaj hungaraj pentristoj, grafikistoj kaj skulptistoj almilitis por si honorindan rangon en la publika opinio de la internacia kulturo (en 1969 Imre Bak, Huba Bálványos, Tamás Bencze kaj György Kemény ricevis tian honoran distingon).

Sed la internaciaj ekspozicioj estas nur unuj kaj eĉ ne plej signifaj forumoj, en kiuj la hungara arto prezentiĝas. En la kadro de internaciaj interŝanĝaj programoj, laŭ invito de urboj kaj institucioj, niaj artistoj venas en la landojn de ĉiuj kontinentoj, ekde Aŭstralio ĝis Norvegio, ekde Anglujo ĝis Japanujo, en 55—60 landojn jare, por prezenti siajn kreaĵojn. Kaj en tiaj ekspozicioj, ne nur la samtempa arto estas reprezentata, sed ankaŭ la historia paseo, la tradicioj. El tiuj retrospektivaj ekspozicioj elleviĝas per sia ekstreordinara signifo la ekspozaĵo en *Petit Palace* de Parizo (1966) kaj en *Victoria and Albert Museum* de Londono (1967). Ĉi tiuj reprezentis per tabulpentraĵoj, statuoj, gravuraj, teksaĵaj, libraj kaj ceramikaj majstroverkoj la arton de 10 jarcentoj kaj unuafoje donis bazon, laŭ skalo tiel larĝa kaj resuma, por la komparado kun la evoluo de la Eŭropa arto. Ili vekis veran revelacion: centoj da kritikoj parolis pri la »malkovro« de la hungara arto, kaj dekmiloj vizitadis la ekspoziciajn salonojn.

Sed la mondira hungara arto serĉas kontakton kun la eksterlando ankaŭ per enlandaj ekspozicioj: tra la pordegoj de la internacia kunlaboro alvenas, sur 50—70 ekspozicioj jare, kreaĵoj de plurcent artistoj en la Budapeŝtajn kaj provincajn muzeojn, ekspoziciajn salonojn kaj galeriojn. La plej granda institucio de periodaj ekspozicioj, la 12-salona Belarta Halo, per siaj ekspozicioj akiris renoman famon malproksime trans la landlimoj. Ĉi tie prezentis la Galerio *Louis Leiris* 150 grafikaĵojn de *Picasso*, la Muzeo *Fernand Léger* en *Biot* la grafikaĵojn, statuojn kaj tapiŝojn de *Léger*, la *British Council* la statuojn kaj grafikaĵojn de *Henry Moore*, la Galerio *Denise René* la ĝis nun plej grandan retrospektivan ekspozicion de *Victor Vasarely*. Kaj estas plu listigeblaj la granduloj de la mondo: la jugoslava skulptisto *Ivan Mestrovic*, la hungardevena itala skulptisto *Amerigo Tot*, la sovetaj skulpistoj *Sadr*, *Muhina*, *Jefimov*, *Konenkov* kaj pentristoj *Dejneka*, *Sarjan*, la svisa pentristo *Remo Rossi*, la pola pentristo *Tadeusz Makowski*, la germanaj skulptisto *Ernst Barlach* kaj grafikisto *Käthe Kollwitz:* iliaj individuaj kolektaĵaj ekspozicioj estis elstaraj eventoj de la hungara arta vivo. Tiel same, kiel la resumaj ekspozicioj pri reprezentantoj de poaj artotendencoj kaj skoloj: belga ekspresionismo, *École de Paris*, *Réalités Nouvelles*, aŭ pri plej novaj klopodoj, pri rezultoj de la proksima paseo. Argentinaj, boliviaj, britaj, bulgaraj, ĉeĥoslovakaj, egiptaj, finnaj, francaj, germanaj, ghanaj, grekaj, hindaj, nederlandaj, siraj, sovetaj, turkaj kaj multaj alilandaj bel- kaj industri-artistoj prezentis sin en en ekspozicioj al la hungara publiko.

Pri la hungara artovivo de la jarcento-turno memoras dekduoj da anekdotaj kaj priartaj verkaĵoj. Ilia plimulto sciigas pri tio, ke niaj artistoj ofte devis migri piede al Parizo, se ili volis koni la plej freŝajn rezultojn de la moderna arto. La historiisto de la nuntempo povas noti, ke la ekspozicioj de muzeoj kaj galerioj nun portas surloken la arton de la mondo: la klasikajn ĉefverkojn de la universala arto, la plej eminentajn majstrojn de la proksima paseo kaj la novajn markotojn de la nuna arto. Dank' al ilia perado malaperas la limoj kaj sen speciala penado akiras konojn kaj spertojn la artisto, arthistoriisto, artkritikisto kaj artamanto.

Trad. *A. K.*



PLILONGIGU VIAN EKSTERLANDAN RESTADON... MALLONGIGU LA VOJAGTEMPON...

FLUGU PER MALÉV!

Rektaj fluglinioj inter BUDAPEŜTO kaj la ĉi-subaj urboj:

AMSTERDAMO	DAMASKO	LENINGRADO	PRAGO
ATENO	DUBROVNIKO	LONDONO	ROMO
BEJRUTO	FRANKFURTO	LUKSEMBURGO	STOKHOLMO
BEOGRADO	HELSINKO	MILANO	SOFIO
BERLINO	ISTANBULO	MOSKVO	TIRANO
VIENO	KAIRO	MUNKENO	TUNISO
BRUSELO	KIEVO	NIKOZIO	VARSOVIO
BUKAREŜTO	KONSTANCO	OSLO	ZURIĤO
	KOPENHAGO	PARIZO	

MALÉV biletvendejoj:

Budapest V., Váci utca 1.

kaj

Dorottya utca 2.

TELEFONO: 186—805

MALÉV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

(HUNGARA AERTRAFIKA ENTREPRENO)

Dro István Szerdahelyi

Esperanto kaj la moderna lingvoscienco

Estas konate, ke la tradicia lingvoscienco preskaŭ senrimarke preteris la problemon de la internacia lingvo, aŭ almenaŭ klopodis bagateligi ĝian signifon (escepte kelkajn estimindajn lingvistojn). Sed en la nuntempa lingvistika literaturo pli kaj pli ofte oni renkontas aludojn al interlingvistikaj problemoj; tion klarigas, ke la *modernan lingvosciencon* forte influas la cibernetika koncepto, kaj krute ŝanĝis ties metodon. La esenco de la nova metodo estas: esprimi ĉion kiel eble plej ekzakte, preskaŭ matematike. Lastatempe la lingvistoj pli kalkulas ol spekulas: foliumante filologian verkon, oni ne povas diveni, ĉu en ĝi temas pri matematika lingvistiko aŭ pri lingvistika matematiko. Svarmas en tiaj verkoj la terminoj „modelo", „strukturo", „algoritmo", „formulo", „operacio", „ĉifro" ktp. Formaligi ĉion formaligeblan, modeligi ĉion modeligeblan — jen la moderna lingvistika tendenco. Jen kiel Prof. Zsigmond *Telegdi* formulas[1] ĉi tiun klopodon: „. . . *la gramatikisto havas la eblaĵon uzi dum siaj esploroj pensmanieron evoluintan en la matematiko, uzi matematikecan teknikon kaj per tio doni al gramatika priskribo veran ekzaktecon . . . La esprimformoj estas figureblaj per formuloj; tia formulo reprezentas ian operacion: elektadon kaj sistemigon de certaj elementoj. Sed tiuj elementoj estas signoj, do havas signifon, sekve la formuloj senpere reflektas operaciojn per signifoj* . . . (p. 8).

La formaleco, logikeco, artefariteco, eĉ kelkfoje la ŝablonoj mem ne estas plu hontindaj: sen ili estas ja maleble orientiĝi en la kaosa amaso de novaj kaj ĉiam pli novaj informaĵoj. Kaj la maŝinoj komprenigis al la homoj, ke ĉiu homa produkto estas ja valoro, ĉar enestas en ĝi la spirito de ĝia kreinto, de la homo.

II.

Tiu moderna lingvistika koncepto favoras Esperanton. La lingvistoj vole-nevole devis rekoni, ke tiun vojon jam faris antaŭ ili la interlingvistoj, ke antaŭ iliaj formaligitaj „logikaj" lingvoj jam ekzistis aliaj, kaj tiu rekono instigis ilin okupiĝi pli serioze pri la interlingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto speciale.

Ĉi-rilate Esperanto aperis verŝajne unuafoje *en la traduk-sistemo de rusa inventisto* Pjotr Petrovič *Smirnov-Trojanski*. Li konstruis tute simplan parol-aparaton (la pra-varianton de la nuna tradukmaŝino) en 1933.[2] Por tiu aparato li konstruis „maŝin-interlingvon" el 25 simboloj, kiujn li nomis „simboloj de logika analizo". Jen kiel li priskribas sian metodon:

„*Analizante logike la tekston, mi kvazaŭ lasas ekster krampoj tion, kio estas komuna en la lingvoj* (t. e. la „logikajn" sintaksaĵojn, I. SZ.) *kaj metas inter krampoj tion, per kio ili diferencas* (t. e. la leksikon, I. SZ.)

Komunaj en la lingvoj estas la gramatikaj kategorioj (nominativo, pluralo, prezenco ktp., krome la participoj, konjunkcioj ktp.). Por ili li elektis simbolaron. Jen kiel aspektas „abstrakta" frazo de *Trojanski*:

LA — O DE LA — O — AS, KIEL
LA — O — AS, KIEL LA — O — AS

La klarigoj de la simboloj estas: —O: substantivo, nominativo singulara; —AS: verbo, indikativo, prezenco; DE: prepozicio, de genitivo; Por esperantistoj, mi pensas, tiuj ĉi klarigoj estas superfluaj.

Bedaŭrinde, la aŭtoroj, kiuj recenzis la metodon de *Trojanski* kaj prezentis ĝin al la granda publiko, forgesis noti, ke la simbol-signoj estas simple pruntepreni-taj el Esperanto.

Ni vidu ekzemplon, kiel funkcias la traduk-aparato de *Trojanski*. La supra abstrakta frazo povas aspekti jene en Esperanto kaj en tri lingvoj:

La bildo de la mondo montras, kiel la materio moviĝas, kiel la materio pensas. — Das Bild der Welt zeigt, wie die Materie sich bewegt, wie die Materie denkt. — Le tableau du monde montre, comment la matière se meut, comment la matière pense. — Kartina mira pokazyvaet, kak materija dviĵetsja, kak materija myslit.

La tekston en logika analizo trilingva oni povas vidi sur la sekvanta kolumno inter du horizontalaj linioj.

Sinteze, oni provizas la vortojn per formoj konformaj al la signal-signoj, kaj oni ricevas la supre kursive presitajn frazojn.

Preskaŭ sammaniere uzas la E-ajn gramatemojn la eminenta franca lingvisto *Tesnière* en sia verko

das Bild —O	le tableau —O	kartina —O
die Welt DE —O	le monde DE —O	mir DE —O
zeigen —AS	montrer —AS	pokazyvatj —AS
wie —	comment —	kak —
die Materie —O	la matière —O	materija —O
sich bewegen —AS	se mouvoir —AS	dviĵetsja —AS
wie —	comment —	kak —
die Materie —O	la matière —O	materija —O
denken —AS	penser —AS	myslitj —AS

„La elementoj de la strukturala sintakso".[3] La verkon analizis Sándor *Károly* en ampleksa artikolo: „La sintakso de Tesnière kaj kelkaj demandoj de la sintakso".[4] Ni citu el ĉi tiu artikolo:

„*Per la simboligo de la sintaksaj nocioj estas esprimebla la struktura skemo de la frazo sen ĝia semantika enhavo. Ni uzu la 4 vortklasajn kategorio-finaĵojn de Esperanto: O = = substantivo, A = adjektivo, I = verbo, E = adverbo. Tiam ekzemple la skemo de la frazoj:*

Alfred parle bien *Alfred spricht gut*
Aulus loquitur bene (Alfredo parolas bone)

estas en ĉiuj kazoj la sama:

Poste:

„*Ĉe Tesnière jene aspektas la simpligita frazstruktura skemo post la kuntiro de agportantoj, signitaj per liaj* (Tesnière-aj) *simboloj:*

(Tio montras, kian komplementon povas havi la diversaj sintaksaj elementoj.)

Konklude: La cititaj ekzemploj demonstras, ke la Esperanta simbolsistemo estas la plej taŭga rimedo por la signado de la gramatikaj universalioj.

III.

En la moderna lingvistiko oni do rekonis la interlingvojn, neglektatajn de la tradicia lingvistiko, kaj oni trovis ĝian lokon en la sistemo de la lingvistikaj branĉoj.

Denisov jam klare deklaras, ke la interlingvistiko estas „la *scienco* pri la internaciaj helplingvoj" kaj klasifikas ĝin kiel „*pracibernetikan lingvomodeligon*". En sia verko[5] li dediĉas apartan ĉapitron al tio (la 1-an, pp. 5—28) sub la titolo „Lingvistika modeligo antaŭ la apero de cibernetiko kaj elektronikaj kalkulmaŝinoj". La ĉapitro komenciĝas per mallonga trarigardo de la unuaj lingvoprojektoj, kun la citado de jenaj nomoj: Beda Venerabilis, Josef d'Anchieta, Manuel de Vega, John Wilkins, Dalgarno; la lingvo Solresol; poste Descartes, Ampère, Leibnitz, grandaj scienculoj; Schuchardt, Baudouin de Courtenay, Sapir, Mar, famaj lingvistoj. Krome estas menciataj: Cohen, Martinet, Couturat, Lalande, Drezen, Mounin, Lott, Bacon . . . Tio pruvas, ke la aŭtoro serioze okupiĝis pri ĉi tiu parto de la problemo kaj klopodas sufiĉe objektive informi pri ili. Precipe gravaj estas liaj konstatoj demonstrantaj la rilaton inter la antaŭ- kaj post-cibernetikaj lingvoj; per tiuj li pruvas, ke el la metodo de la internaciaj lingvoj kaj Esperanto multe ĉerpis la konstruantoj de la t. n. „maŝin-interlingvoj" (p. 100).

Bedaŭrinde, la aŭtoro perdas tiun objektivecon (kaj per tio senigas la ĉapitron de ĝia seriozeco), kiam li okupiĝas pri Esperanto.* Unue, li akuzas la seriozajn lingvistojn, okupiĝintajn pri la interlingva problemo, ke ili per tio (mi citas) „. . .*kontribuis al la dissemado de diversaspecaj romantikaj mitoj, kreitaj poste de nekompetentaj entuziasmuloj.*"

Due, la aŭtoro asertas, ke

1) tiaj lingvoj ne povas eviti la fonemikan kaj semantikan evoluadon, sekve ili disdialektiĝos;

2) estas nereale paroli pri la simpleco de E—o kaj similaj lingvoj tiel longe, dum ne estas konataj la kriterioj de la taksado de lingvo-efikeco:

3) ne estas ĝuste nomi tiajn lingvojn kiel E—o logikaj, ĉar ne la reguleco de la paradigmoj gravas, sed, kiel jam Descartes menciis, la enhava flanko de la lingvo. Mi citas: „. . .*sen la transformuligo de la senca flanko, tian lingvon kiel E-o oni povas verki laŭvorte en ses horoj.*" (Tiele!) „*Por tia logika plibonigo de lingvo necesas nur vortaro kaj elementa gramatiko*" (p. 8).

4) Kio koncernas ian dekreton, ke la homaro akceptu unuecan lingvon kiel E—o, tia eblaĵo estas utopio.

Mi pensas, ke estas superflue okupiĝadi pri la refuto de ĉi tiuj opinioj. Disdialektiĝo ne povas okazi en lingvo, kiu, kiel ĉies dua lingvo, estas uzata precipe inter diverslingvanoj. Koncerne la „dekreton": ni vivas en epoko de la realiĝo de utopioj.

Konklude: Malgraŭ la neĝustaj kaj nesciencaj konstatoj rilate al E—o, la verko de Denisov estas tamen signifa, ĉar ĝi:

a) rekonas la sciencan valoron de la interlingvistiko;
b) klasas la interlingvistikon inter la branĉojn de la lingvoscienco.

Alian lokon destinas al la interlingvistiko la fama estona lingvisto vivanta en Svedlando, Valter TAULI[5b] en sia brila verko pri lingvo-planado. La lingvoplanado, laŭ TAULI, estas „tiu metodologia procedo, kiu okupiĝas pri la regulado kaj evoluigo de la ekzistantaj lingvoj, aŭ pri la kreado de novaj regionaj, naciaj aŭ internaciaj lingvoj". Li dediĉas al la problemo de artefaritaj lingvoj la VIII-an ĉapitron de sia verko. *(Finota)*

* En Moskvo, dum mia studvojaĝo, mi havis la ŝancon kune labori kun kolego Denisov en la „Scienca-metodologia Centro de la Rusa Lingvo", kie li gvidas la sekcion de leksiko. Foje ni diskutis dum ne mallonga tempo pri Esperanto, kaj ŝajne mi sukcesis lin konvinki, ke ĝi meritas pli da tempo dediĉata al ĝia pli profunda kono. Kaj mi esprimis mian konvinkon, ke tiuokaze ankaŭ lia opinio estos multe pli reala.

MORTO DE ŜANEK

Vilmos Benczik

Ŝanek singarde, senbrue etendis la dekstran kruron. Jam lia tuta korpo torporiĝis pro la longa, senmova sidado, sed — kvankam estis jam preskaŭ tute malhele — li ne riskis ekstari, kiom ajn tion postulis la rustiĝintaj muskoloj. Liaj manoj spasme premis la mitraleton, nur pro rutino, ja li sciis, ke la kuglujo estas malplena.

Li ne komprenis la okazaĵojn de la lastaj horoj. La esploristoj asertis, ke la vilaĝo devas esti malplena, la germanoj forportis sin, sed kapitano Vasiljenko estis homo akurata kaj sendis al la vilaĝo sub la komando de serĝento Rublev tri homojn por akiri finan certecon. Ŝanek eksentis, ke venis lia tempo. Jam delonge li enviis la esploristojn pro la speciala atento de la komandanto — tiu konis ilin ĉiujn laŭnome — kaj ankaŭ pro la multaj privilegioj, kiujn ili ĝuis. Jam ne unufoje li petis serĝenton Rublev, ke li permesu kuniri, sed tiu ĉiam rifuzis, parolante pri danĝereco. Nun la serĝento devos doni permeson, ja li mem asertas, ke la vilaĝo estas malplena. Ŝanek bone konkludis, ĉar post kelkmomenta senkomprena gapo Rublev rezigne konsentis:

— Venu . . . Tio estos ekskurso por turistoj, ne esplorado.

Post kelkaj minutoj Ŝanek jubile aliĝis al la ekiranta grupo. Ili ekvojis kvinope: tri esploristoj, kiujn apenaŭ li konis, serĝento Rublev kaj li. La vilaĝo situis je ĉirkaŭ ses kilometroj: tri el ili jam ekster la arbaro. En moroza atmosfero ili atingis ĝin: la tri esploristoj grumblis pro Ŝanek, Rublev sakris pro la obstino de la komandanto, nur Ŝanek jubilis interne, sed la grumblado de la kamaradoj baldaŭ forvelkigis ankaŭ lian ĝojon. Tute senzorge ili eniris la vilaĝon, kaj estis videble, ke ili pravis. Tion konfirmis ankaŭ la konsultitaj vilaĝanoj: la lasta germana aŭtomobilo forveturis ĉirkaŭ la naŭa matene. Rublev elpoŝigis sian horloĝon kaj kolere montris al la esploristoj:

— Jen, antaŭ ses horoj, kiel ni diris, sed la kapitano ne kredas. Nu, ni rigardu kelkajn domojn kaj stalojn, kaj antaŭpreparu ruĝan kurtapiŝon por la kapitano. Vi, Ŝanek, faru, kion vi volas, sed kondutu inde kaj restu en nia proksimo.

Ili eniris la korton de ne malriĉa kamparana domo: la domanoj kun tima servopreto plenumis la instrukciojn de Rublev, kiu ĉien enŝovis la nazon, murmurante ion pri la ruĝa kurtapiŝo kaj kapitano Vasiljenko. Ŝanek eliris el la domo kaj komencis observadi la malplenajn brutejojn. Li malfermadis ĉiujn pordojn, sed krom kelkaj kokinoj li renkontis nenian beston. Certe la germanoj manĝis ĉion — li pensis kaj reiris al la domo. Sur la verando staris la dommastro — mezaĝa, graseta kamparano — kaj urbane vestita juna virino, kun longaj, plektitaj nigraj haroj. Ili verve klarigis ion al Rublev, pli ĝuste nur la dommastro, ĉar la virino staris senmove, kun larĝe malfermitaj okuloj kaj rigardis al la foro. Rublev atente aŭskultis, komprene jesis per la kapo, fine adiaŭis kaj iris post la esploristojn, kiuj jam agadis ĉe alia domo.

Per malrapidaj movoj ankaŭ Ŝanek ekiris al la pordo, sed lia rigardo daŭre fiksiĝis al la virino, kiu kun statua rigido staris sur la verando. Ŝanek ensorĉite gapis ŝin — la densaj nigraj harplektaĵoj memorigis lin pri la hejmaj knabinoj, kvankam ŝia haŭto estis multe pli hela kaj ankaŭ la trajtoj tipe Eŭropaj, tamen en li vekiĝis memoro pri Taĝikujo kaj sentis kunpremiĝi la koron. Senkonscie li haltis kaj lia tuta esto, forto, sentimento koncentriĝis en tiu rigardo. El liaj okuloj radiis ne sopiro, sed sincera, infana miro kaj stranga nostalgio. Post kelka tempo ankaŭ la virino rimarkis lin kaj ŝia rigardo renkontiĝis kun la lia. Ŝi rigardis intense, la profundo de la okuloj kvazaŭ ensorbis lin, sed verŝajne la bildo de Ŝanek ne atingis ŝian konscion.

El la najbara korto — kien Rublev kaj la tri esploristoj iris — ekfendis la aeron seriopafoj. Ŝanek abrupte turnis sin kaj ekvidis tie grupon de civile vestitaj, sed armitaj homoj. Sur la maldekstra brako ĉiuj havis ian bendon. Kun rutina movo Ŝanek levis la mitraleton al tiu direkto, kaj pafis, sed la kuglujo estis preskaŭ malplena. Rublev kaj la esploristoj ne estis videblaj, sed evidente la pafoj de la civiluloj celis ilin. Ŝanek dum ono de sekundo konstatis, ke rifuĝi tra la strato ne eblas, kaj ekkuris al la brutejoj. Kurante ankoraŭ li ĵetis rigardon al la verando, sed intertempe la virino malaperis. Tio iomete trankviligis lin, kaj ŝire malferminte la pordeton de la kokinejo li enpuŝis sin. La pafado baldaŭ silentiĝis. Ŝanek ĉirkaŭrigardis. La kokinejo estis tre malvasta kaj malalta, sed

tra la difektita plafono ĝin sufiĉe penetris la lumo. Li klopodis preni komfortan pozicion, sed pro la malvasteco de la loko li ne sukcesis: ĉiam torporiĝis iu lia membro.

Tiel do li sidis, premante, pro rutino, la mitraleton, ĝis fariĝis mallume. Li jam volis eliri, sed ekaŭdis laŭtan interparolon el la korto. En la lumo ĵetita de la kuireja lampo al la korto li rimarkis armitajn civilulojn. Kolere ili riproĉis ion al la dommastro, direktante al li sian mitraleton, sed tiu konstante neis per la kapo kaj lamente provis ilin konvinki pri io. Ŝanek komprenis nenion, sed ekvidinte, ke ankaŭ la virino kun harplektaĵoj staras apud la dommastro, li komencis timi. Prave, ĉar abrupte du el la civiluloj kaptis la brakon de la mastro, dum la tria kondukis la virinon al la muro. La situacio estis nemiskomprenebla: al Ŝanek ekestis bulo en la gorĝo, dum kelkaj sekundoj li rigardis la scenon paralizita, poste kun ega hurlo li elsaltis el la kokinejo kaj — tenante sian mitraleton bastone — kuris al la civilulo kondukanta la virinon al la muro. Lia mitraleto leviĝis supren kaj falis kun terura batego sur ties kapon. La kranio frakasiĝis kiel maldikŝela juglando.

La neatendita apero de Ŝanek timigis la civilulojn, sed nur por kelkaj momentoj. Post la bato li ne forkuris, sed kun la sama infana miro, kiel posttagmeze, rigardis la senkomprenan, eĉ indiferentan vizaĝon de la virino. Iel li komprenis, ke tiu ĉi virino ne hazarde vekis en li la memoron pri la hejmo, li eksentis, ke ankaŭ ŝi — eble eĉ pli ol li — estas fremda inter tiuj homoj, kvankam komprenas iliajn vortojn. Li eksentis, ke tiu ĉi virino estas pli mizera ol li, kiu en malfacilaj horoj povas malfermi la okulojn kaj repensi pri Taĝikujo, kie ankaŭ vento blovas iel pli amike; ŝi ne havas sian Taĝikujon, certe ne, eble iam havis, sed perdis ĝin. Senlima kompato vekiĝis en li, sed en tiu momento la surprizo de la civiluloj forflugis kaj ekkrakis la mitraletoj. Ŝanek tuj falis kaj ne povis vidi, ke ankaŭ la stranga virino ricevis la kuglon sammomente kiel li.

* * *

Tio okazis en Transdanuba vilaĝo, la 28-an de decembro, en 1944. La sovetaj taĉmentoj post kelkaj horoj enmarŝis en la vilaĝon, kaj la sagokrucanoj ne ĝisvivis la matenon. Oni trovis la kadavron de la virino kaj de Ŝanek. Kiel unu el la kuracistoj konstatis, lin trafis ventropafoj kaj li multe suferis antaŭ la morto.

Oni ne scias kaj neniam ekscios, kiaj pensoj kaj bildoj aperis al Ŝanek dum la agonio. Tamen estas tre verŝajne, ke la virino kun la nigraj harplektaĵoj havis gravan rolon en ĝi. Liaj kamaradoj ne dubis, ke li pensis ankaŭ pri la patrino, kiu perdis en li la solan apogon kaj antaŭvidas vivon ne facilan. Verŝajne agitetis lin ankaŭ la demando, kiel tiuj civilaj hungaroj povis okupiĝi pri likvido de samlandanoj, kiam ili evidente sciis, ke la sovetaj taĉmentoj estas je kelkaj kilometroj de la vilaĝo.

Supozeble tiaj pensoj svarmis en la kapo de la mortanta Ŝanek. Kaj tiuj pensoj ne lasis al li tempon mediti pri la grandioza signifo de la batalo, en kiu li partoprenis, ja ankaŭ cetere li ne multe komprenis la vortojn »faŝismo«, »imperiismo« kaj similajn, kvankam la komisaro ofte parolis pri ili al la soldatoj. Ankaŭ pri la fina rezulto de la batalo li ne pensis.

Li nur mortis.

MILÁN FÜST

LETERO PRI LA MORTO DE EDIPO

„Oidipus!" — ni kriis kaj laŭtege eksploregis ni kun brakolev.
Ĉar la sanktajn leĝojn, bronze kaj homkore ĉizitajn rompis li.
Trumpetoj tiam sonis tranĉe kaj post ili kiel fajrotorent
Falegis de sur flanko de monto la jarcenta malbeno de Mitras.
Patrinoj junaj kaj seriozaj angore rigardis sian bebon, kiu dormis sur ilia brust.
Ardaĵo la kampojn ĉirkaŭkuris, — subiris la sun.
Nigriĝis la flanko del monteto kaj ĝiaj frondoj; ĉevala kadavrar
Kuŝis sur ĝi dise . . . ĉar kuro sovaĝa estis tio ĉi, ekscita, lasta kuro sovaĝa
De la heroldoj; ankaŭ ili, kiel sako, tiele falis, tiele sub la arboj sternis sin
Tuj post sia elseliĝo kaj rakontis, ke al Edipo stas finite jam.
Pli fore, sur angulo de plac la saĝuloj, kaj eĉ pli fore eta grupo kun sakflutoj trapikitaj,
Tiel same veantaj, pri li funebraj, kaj lamentantaj kiel orfa infanar
La sakflutistoj de la granda kulpa reĝ.
Sed kelkaj leĝeraj facilulinoj, kvazaŭ nenion ili aŭdus, sukis al si la lipojn per langeto kaj tiamaniere rigardis ĉirkaŭ sin.
Bukloj iliaj kiel nuboj krispis, kaj tremis al ili la eta agema man . . .
Ili nur metadis-agadis dum klakado de pantofloj siaj, prefere aliĝis al restintoj, ankoraŭ vivantaj, luktvenkintaj la ĉevalojn sovaĝajn,
kaj nun kuŝantaj duonsvene, dum mano aŭ flustro virina ne dolĉigis al ili la lacan dormon.
Aĥ, serioza la leĝo! — diradis ankaŭ ili, sed ne kredis. Kion ili pensis?
Mi ne scias, ho, mi ne scias. Ŝajnas, ke ordono ne ekzistas sur la ter,
Kiu povus bridi ilian fajron kaj turni al niaj zorgoj la timonon de ilia mens.
Ilia la ter, ĉar ilia la pek! Ja kio al ili la sufero del printempo, kio la dolor,
kaj la granda plor de la forlasitoj sube en malsupro de la val?
Hartuber' al kelkaj estis metita kiel al impertinentaj ĉien-nazoŝovaj knabinetoj,
. . .Kaj unu el ili fine la belan kapon turnis eĉ al mi.
Kaj atendis. Por ke kiel besto soifa, trovinta fonton, mi trinku el ŝia okul-lum.
Jen estis la damno, ho reĝo Oidipus. Dum ni malbenadis, ni malbenis la volupton kaj volintus niajn virornamojn ĵeti for . . .
Ĝuste tiutage, kiam ni vin priploris: jen dronis ankaŭ mi, fariĝinte la sklav
de voluptoj ĝisfine-ne-videblaj. Sombraj maroj kaŝas jam mian junecon puran.
Hetajro min posedas, kaj, mi sentas, por eterne. Mi ne povas ekzisti jam sen ŝi,
Ĉar ĉiam ŝi nudas kaj ĉiam ridas. Ringoj sur ŝiaj fingroj . . .
Ho lasu min, al mi la vortoj mankas . . . kaj kompanon vian jam forgesu por etern.

Trad.: K. Kalocsay

Por kio veturi surlunen?

Post la unuaj luno-konkeraj ekspedicioj oni povis legi en diversaj hungaraj presaĵoj tre interesajn, profundajn pensojn de *d-ro György Marx, fizikisto-scienculo* (de kiu ni jam povis legi en la Hungara Vivo: La plirapidiĝanta tempo, 1969/2). La artikoloj meritas la ĉitiean resumon, ja ili esprimas supernaciajn, tuthomarajn ideojn.

Profesoro Marx citas la faman arkto-esploriston, Fridtjof Nansen: *„La historio de la homa genro estas senĉesa luktado for de la mallumo al la lumo. Ĝuste tial estas sensence diskuti la utilon de la scio — la homo deziras la konojn, kaj se li ne deziras ilin, li plu ne estas homo."*

La homoj, neglektante do la vivon kaj la havaĵon, serĉis ekkonendajn terenojn, kaj pliriĉigis la tutan homaron.

Ĝuste en nia jarcento, en nia vivo okazis la lastaj grandaj geografiaj malkovraĵoj. En 1909 la homo atingis la Nordan, en 1911 la Sudan Polusojn. En 1953 li surgrimpis la plej altan punkton de sia planedo, kaj en 1960 mergiĝis ĝis la plej profunda fendego de la oceanoj. Per tiuj finiĝis la geografiaj ekspedicioj por malkovro de nekonataj teropartoj. En 1960 la homo definitive venkis la terajn barojn: la Tero iĝis tro malgranda por la homa esplorado.

Estas preskaŭ laŭleĝe, ke en 1961 la unua kosmonaŭto, J. *Gagarin* ekiris al nova dimensio, al nova mondo. Kaj en la sama jardeko, en 1969, per la rezulto de grandega evoluo teoria-teknika, la homo konkeris la Lunon.

La kosmoesploro, la spacveturado tute ne estas malmultekosta esplormetodo. La unuaj glorriĉaj paŝoj surlunaj metas la demandojn: *Kial veturi surlunen? Kion ni serĉas tie? Ĉu tio meritas la penadon?*

La homo alkreskis al sia naskiĝplanedo. Estas nature, ke li senreste ĝin koni volas, por fari ĝin kiel eble plej komforta en sia vivo. La scienculo kvazaŭ deziras teni en siaj manoj la Globon por mezuri, por elkoni ĝin. La praktika vivo kaj la scienco ofte metas demandojn, kies respondoj bezonas kaj forglutas multege da laboro kaj mono. Laŭ la historiaj spertoj meritas homklopodon la ĝustaj respondoj, ja per ili la Tero donas pli komfortan hejmon por pli multe da homoj.

Por atingi la celojn, la homo uzas foje mikroskopon, foje traktoron, foje spacraketon. Kosmaj veturiloj ekiras al la Luno. Se ni deziras venki la malriĉon, la malklerecon, la malsanon, ni devas uzi vastan strategion. Por tio ni bezonas esploristojn kaj ankaŭ kosmonaŭtojn. *„Navigare necesse est"* (navigacii estas necese) diris la antikvaj romianoj. *Hodiaŭ, en la dua duono de la 20. jarcento la spacveturado estas historia necesaĵo.*

La leĝoj de la universo estas unuecaj. La naturscienco estas nedividebla. En kiu ajn ĝia branĉo ni atingas novajn konojn, ĉi tiuj reagas al ĉiu scienco: ĉiu kono altigas la Tuton, kaj ĉi tiu portas kun si antaŭen siajn partojn.

Galilei kaj *Newton* studadis la movojn de la astroj per siaj teleskopoj. Ili ne demandis ties utilon. La frukto de iliaj penadoj estis la mekaniko: la scienco, kiu unuece priskribas la movojn de la surteraj kaj surĉielaj korpoj. *La konstruistoj de la pontoj, maŝinoj, veturiloj apogas sin sur la malkovraĵoj de Galilei kaj Newton.*

„La Luno estas la Rosetta-ŝtono de la Sunsistemo, per kies helpo ni povas deĉifri la hieroglifojn de la historio de la planedoj" — citis profesoro Marx la usonan astronomon *R. Jastrow.* Plenrajte ni esperas, ke la luno-ekspedicioj donos en niajn manojn la ŝlosilon, per kiu ni povas solvi la grandan enigmon astronomian: *la demandon de la estiĝo de la Sunsistemo.* Tiel kaj per tio ni povas pli profunde kompreni nian hejmon, la Teron.

Sendube troviĝas ja konkursemo, romantikaj trajtoj en la fono de la granda entrepreno: la surluna veturado. La homo ĉien ajn aliris, ĉu estis utile por li, ĉu ne. Sed krom tio nun ni volas elkoni la Lunon, la frateton de la Tero, kies vizaĝon ne maljunigis la aero, la akvo kaj la erozio de la vivantaro. Tie vidiĝas nude la rokoj-ŝtonegoj originalaj: la Luno estas kvazaŭ la skeleto de la Tero, ĝi montras la geologie esencan. Kion ni facile ekkonas sur la Luno, tio helpas kompreni ankaŭ nian Teron. Tiuj konoj povas fari pli klara, pli saĝa, pli facila la vivon de la estontaj generacioj.

La valoron de la senpera Luno-esplorado tamen ne donas nur tiaj astronomiaj-geologiaj informoj. La plej granda malkovraĵo ne naskiĝis sur la Luno, sed ĉi-tie, en la kapoj de centmilionoj. La apero de la homoj sur la Luno ne estas la plej utila, sed sendube la plej okulfrapa salto de la scienca-teknika revolucio ĉi-jardeka. Krisigno, kiu atentigas nin pri longa frazo.

La unuaj surlunaj ekspedicioj instruis nin: *meritas oferojn la scienco kaj kulturo, ĉar nin ĉiujn altiras la belo kaj la nekonata.* Ne disiĝas la tekniko kaj naturscienco disde la arto kaj historio. Vidinte tra la televido la homojn sur la Luno, ni estis fieraj kaj feliĉaj, ke ni estas homoj.

Kaj la astronaŭtoj rakontis: la Luno estas malbela, griza ŝtonarego. La plej bela vidindaĵo tiea estis la kolorplena Tero. Kaj certe, la plej varma sento estis por ili dum la reveno vidi pligrandiĝi la plej lastan celon de ĉiu kosma veturado: la patringlobon.

Aŭrel *Ponori Thewrewk*

Kuracado per akvo

– KURACBANEJOJ EN HUNGARIO –

Ne estas surprize, ke en nia ekscita moderna epoko multaj malsanoj turmentas nin. De mateno ĝis vespero ni rapidas, per nigra kafo kaj alkoholaĵoj ni ekscitas nin, vespere per dormigilo ni provas ekdormi. La medicinaj esploristoj inventas novajn kuracilojn por mildigi niajn dolorojn kaj ni manĝas kaj trinkas medikamentojn en granda kvanto. Post resaniĝo ni denove vivas kiel antaŭe. La kuracistoj preskaŭ vane atentigas nin: ni vivu pli nature kaj uzu pli el la naturaj kuracmetodoj.

La plej populara kaj plej sukcesa el ili estas la kuracado per akvo minerala.

En Hungario la kuracado per varma akvo minerala havas longan historion. La famon de la hungaraj kuracbanejoj fundamentis jam la romianoj antaŭ pli ol 2000 jaroj. Esplorfosadoj apud Budapeŝt atestas pri granda bankulto en la fora provinco de la tiama Roma imperio. La hungaroj konstruis la unuajn sanigbanejojn jam en la 12-a jarcento. Dum la turka okupado (16-a kaj 17-a jarcentoj) floris vigla bankulto ĉirkaŭ la mineralaj fontoj en Budapeŝt. Kelkaj el la kuracbanejoj, konstruitaj de la turkoj, postrestis kaj ankoraŭ funkcias.

Inter la du mondmilitoj la balneologio fariĝis tre grava branĉo de la medicina scienco. En la lasta jardeko la uzado de izotopoj ebligis la sciencan esploron de la efiko de minerala materioj en la homa korpo. La rezultoj de la esploroj superis la esperojn. Pruviĝis, ke la hungaraj kuracbanejoj egalas, eĉ ofte superas en kvalito la plej famajn sanigbanejojn de la mondo.

Hungario abundas en mineralaj fontoj. De la okcidenta landlimo ĝis la plej orienta vilaĝo troviĝas banejoj kuracantaj milojn da malsanuloj, precipe reŭmatismulojn. Sole en Budapeŝt troviĝas proksimume 100 varmaj fontoj kaj *400* fontoj kun amara akvo. Ili donas ĉiutage 70 milionojn da litroj da minerala akvo (kun radium-kaj sulfurenhavo).

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj oni rigardis la kuracbanejojn nur kuraciloj de malsanoj, sed nuntempe ili havas pli kaj pli grandan rolon en la preventado kaj rehabilitado. Tial invitas la hungaraj sanatorioj kaj banlokoj ĉiujn, kiuj preferas naturajn kuracmetodojn al kuraciloj, naturan vivmanieron al dormigiloj. Ili invitas ankaŭ tiujn, kiuj post resaniĝo volus trovi sian lokon inter la laborantaj homoj. La kompleksa terapio redonis la sanon jam al miloj da hungaroj kaj eksterlandanoj. Centoj da tabuletoj sur la muroj de la banejoj memorigas la vizitantojn pri mirindaj resaniĝoj.

Fine estu menciitaj la plej konataj kuracbanejoj de Hungario.

En Budapeŝt estas sep kuracbanejoj kaj ok plaĝoj. La plej ŝatataj estas: Gellért (karbacido, radiumo), Rudas (radiumo), Lukács, Császár (karbacido, radiumo), Király, Széchenyi (sulfuro). Ĉiuj donas kompleksan terapion (kuracado per ŝlimo, balasto, varmega vaporo kaj aero k. t. p.).

En la provinco troviĝas proksimume okdek kuracbanejoj. La plej popularaj estas: Balatonfüred (kalciohidrokarbonato), Hajdúszoboszló (salo-bromo-karbono), Harkány (sulfuro), Hévíz (radiumo).

Gábor *Vigh*



Pál Barczi

Naskiĝis en la jaro 1933, en Nord-Hungarlando, minurbeto Sajószentpéter. Sian diplomon li ricevis en 1958, en la Budapeŝta Altlernejo pri Figuraj Artoj. Liaj majstroj estis János Kmetty, Gyula Papp kaj Károly Koffán. Ekde la finiĝo de la Altlernejo li vivis en Miskolc, apud sia naskloko. Ĉi tiu pejzaĝo kaj liaj samsortanoj, ministoj, laboristoj, inĝenieroj, pedagogoj estas la modeloj de lia grafikarto. Liaj verkoj rolis jam en la patrolandaj kaj eksterlandaj ekspozicioj: Berlino, Praga, Sofia, Varsovio, En la proksima estinteco li ricevis premion pro liaj novaj grafikaĵoj en Landa Grafika Bienalo.

—g—

ÁKOS DUTKA:

BALATONA FIŜISTO

Malnova bark' balancas sin ĉe l'bordo,
ĉirkaŭ ĝi kuras gaja, juna ar'
de ŝipoj, nimfoj, kiel en la bal' . . .
rigardas mastro al ĉiela pordo.

La varma akvo nun aliajn amas,
dum suno brilas, ondo ĵetas sin
al sia sabla kaj kanoza lim',
sin en la lago la remil' ne banas.

Sed flugas jam vespera rob' viola,
flamas la mont', kiel ŝtiparo fora,
ĉar estos nokte ŝtorm' terura, bola.

Sur lia vang' del' vent' rigora signo,
kun rid' trankvila kaj solena digno
li iras al la lag' sur sia olda ligno.

P. *Rados.*

SÁNDOR WEÖRES

LA PAROLANTA FONTO

Eksonas la neeldirebla
sed ne povas eldiri sin mem
ekagas la senmana
sed nur per viaj manoj
ekiras la senpieda
sed nur per viaj piedoj
konscias la senmensa
sed nur per via menso

florkovriĝas la senflora
sed nur per viaj floroj
en fruktoj dronas la senfrukta
sed nur per viaj fruktoj
donacadas la nedonaciva
sed nur per viaj donacoj
indulgas la senindulga
sed nur per via indulgo

preĝadas la senpreĝa
sed nur per via preĝo
lumiĝos la senluma
sed nur per via lumo
eksonas la neeldirebla
sed nur en via koro.

Tr: K. *Kalocsay*



Pál Barczi: Antaŭ la malnova pordo

Lajos Kökény

Esperanto en Hungario

1945–1949.

Kiam la sudorienta parto de nia lando liberiĝis el sub la faŝisma okupado, tuj, jam aŭtune de 1944, reprenis tie siajn fortojn la sociaj movadoj. Post la silentiĝo de la armiloj ankaŭ la E-movado reviviĝis en la urboj Orosháza, Békéscsaba, Hódmezővásárhely kaj Gyula: la tieaj esperantistoj tenis konferencon en Orosháza.

Budapeŝton en la fino de 1944 ĉirkaŭfermis la liberiga Soveta Armeo. Ankoraŭ daŭris la bataloj en la dekstra urboparto Buda, kiam en Peŝt jam kunvenis la laboristoj-esperantistoj por priparoli la refondon de Hungara Esperantista Societo Laborista. Kaj fakte, HESL refondiĝis jam la 25-an de marto en la Sindikata Domo de la Aŭtostiristoj; prezidanto fariĝis *István Kossa*, afergvida prezidanto *Zsigmond Tiborc*. La societo, kiu estis persekutata kaj fine ĉesigita de la Horthy-registaro, tuj post sia reestiĝo ekpropagandis en gazetoj kaj uzinoj. Ĝi ricevis ejon en la sidejo de la Sindikata Estraro, kies ĉefsekretario tiam estis nia karmemora kamarado *István Kossa*.

La dua fokuso de la ĉefurba movado estis en tiuj jaroj la parlamenta palaco: tie eklaboris Hungarlanda Esperanto-Societo, kaj dum jaroj agadis ĉefe por konigo de la lingvo kaj por ĝia enkonduko en la lernejojn.

En 1945 aperis 40-paĝa broŝuro de *Baghy:* „Esperanto kiel kulturfaktoro"; ĝin aperigis donace la eldonisto *Sándor Szalay*, tiama ĉefsekretario de HES, kaj ĝi estis disdonita al ĉiuj parlamentanoj. Apud la Parlamenta ĉambro de kunsidoj, sur la koridoro, komunikaĵoj kaj bildoj pri Esperanto estis ekspozitaj ĉirkaŭe unu jaron.

La 21-an de februaro kaj la 3-an de junio 1946, en la salonego de la Parlamentejo okazis enketoj partoprenataj de politikistoj, verkistoj, altrangaj oficistoj; *Mihály Károlyi*, iama prezidanto de la Hungara Respubliko, letere sendis saluton. La enketo instigis fondi parlamentanan rondon E-amikan por prepari leĝon pri oficiala rekono de Eo kaj fari ĉion eblan por ties lerneja instruado, krome labori por la ĝenerala akcepto de la lingvo, precipe per politikaj rimedoj.

La du E-societoj laboris amike, kaj dank' al ilia laboro jam en 1946 ni ĝuis diversajn permesojn kaj favorajn rekonojn; neniu esploradis, kiu el la du societoj havas en tio meriton pli grandan. La plimulto de la HES-gvidantoj bone konis kaj plene aprecis la laboron antaŭan de la frata societo HESL, faritan tiel en la flego de kulturo, kiel en la servo de la progreso, kaj nun, kiam la laboristaro akiris potencon sortoforman gvidi nian patrujon sur la vojo de la socialismo, plej amike konsiderindaj estis ĉiuj ĝiaj ideoj, proponoj kaj iniciatoj.

En januaro 1946 aperis en Gyula „Sudhungarlanda Stelo"; eliris sep numeroj sur 52 paĝoj, helpante la movadon laŭ siaj ebloj. En oktobro komenciĝis la aperado de „Hungara Esperantisto" en la redakto de *Béla Berceli*, kaj ĝi daŭris ĝis mezo de 1949 tra 16 numeroj.

En aŭgusto 1946, en Orosháza, kunvenis la 16-a Hungara E-Kongreso inter kortuŝaj scenoj de renkontiĝo de malnovaj kunbatalantoj. Samloke kongresis ankaŭ la fervojistoj-esperantistoj, kiuj havis apartan E-sekcion en la Fervojista Sindikato; *Ludoviko Korsós* tiutempe vojaĝis tralande por organizi siajn kolegojn.

En la Parlamento, la 28-an de aŭgusto 1946, la agrarpartia deputito *István Csurgai*, iama membro de HESL, adresis interpelacion al la ministro de instruado. La ministra respondo, post tri monatoj, ne estis tre favora: granda plimulto de la laboristaj deputitoj ĝin ne akceptis. En la Parlamentejo, la 10-an de oktobro 1947, 250 ĉeestantoj festis la 60-jaran Esperanton. Kaj en tiu sama impona palaco estis deklarita, la 8-an de novembro 1947. la *unuiĝo de la du frataj societoj* sub la nomo *Hungarlanda Esperanto-Societo*.

Jam de 1946 la societoj estis sciigataj pri dekretoj, kiuj permesis la instruadon de Eo en la universitatoj, instruistaj seminarioj, baz- kaj mezlernejoj. K-do *Sándor Rónai* ankaŭ kiel ministro pruviĝis fervora subtananto de Eo.

La plej grava iniciato venis de la ĉefurbo Budapeŝt: la 30-an de aprilo 1947, en la Ĉefurba Edukscienca Instituto komenciĝis du kursoj por pedagogoj en 30 instru-horoj. Tiuj kursoj ripetiĝis ankoraŭ dufoje: pli ol 200 pedagogoj tralernis ilin sub la kursgvidantoj *Baghy, Halka, Kökény*.

Tiam la publika opinio estis decide apud Eo almenaŭ en la ĉefurbo. Meze de 1947, la Instituto por Esploro de Publika Opinio anoncis, ke en Budapeŝt 75%-oj de la demanditoj jesis la lernejan instruadon de Eo. Tamen, komence de 1949, kiam la Instituto aranĝis esploron *tutlandan*, nur 5%-an aproban respondon ĝi trovis por tio. Tian saman demandon metis al la Parlamentaj deputitoj la prezidanto de HES, oficanta tiam en la Parlamentejo *(L. Kökény)*. Jese pri la lerneja instruado respondis, printempe de 1948, 102 deputitoj, inter ili *József Bognár, István Dobi, Ferenc Erdei, István Kossa, Aladár Mód, Mihály Révész, László Rudas, Miklós Somogyi, Tibor Vágvölgyi, Péter Veres*.

Fekundaj jaroj por Esperanto! Rekomencis aperi Literatura Mondo eldonata de *Béla Berceli*. Komence de augusto 1947 okazis en Bern la 32-a Universala Kongerso de Eo. Kun helpo (kelkfoje ankaŭ materiala) de la hungaraj instancoj, tiun kong-

reson partoprenis 50 hungaroj, inter ili *J. Baghy* kaj *K. Kalocsay*. Literatura Mondo aranĝis tie artan vesperon.

Multe utilis per priparoloj, personaj kontaktoj kaj plivastigo de propagando la Landaj Kongresoj: en Pécs (1947), en Győr (1948), en Gyula (1949).

En 1947 la Zamenhof-vesperon ni tenis en la plej eleganta filmteatro Forum, kaj festparolis la urbestro mem, *Prof. József Bognár*. Oni prezentis ankaŭ esperantlingvan filmon.

Interesa (kaj redezirinda) iniciato estis en 1948 la I. Danubvala Konferenco, partoprenata de anoj de ĉiuj popoloj Danub-valaj; la kunsidoj okazis en la Parlamentejo kaj en la kunsida ĉambro de la Nova Urbodomo (22—24 de julio). Ĉe la malfermo parolis ree la urbestro *Prof. Bognár*, krome la eksterafera ŝtatsekretario *Iván Boldizsár*, kaj la nova prezidanto de HES, ŝtatsekretario Ferenc *Vasady—Kovács*. La saluton de la jam unuiĝintaj laboristaj partioj (HLP) interpretis *Sándor Kapás*. La konferencanoj vizitis la gvidantojn de la partio kaj registaro, kaj ĉi tiuj certigis ilin pri la subteno de nia movado. Sed amoj povas pasi kaj promesoj forgesiĝi.

Restas ankoraŭ paroli pri la Radio. Mi havis la honoron diri la unuan 15-minutan paroladon en Eo la 17-an de decembro 1946 tra la libera Hungara Radio. Poste, kune kun *Lajos Tárkony*, mi prizorgis tie la E-lingvan informadon ekde la 10-a de marto, komence unufoje, poste trifoje, fine kvarfoje en semajno.

Kiam la duan de oktobro 1949 mi eniris la Radio-domon, mia sekciestro akceptis min jene: „Kara kamarado! De hodiaŭ ne estos dissendo en Eo." „Kio do okazis?" — mi balbutis. „De nun tio estas la linio." — Mi salutis ĝentile la kolegon kaj foriris silente.

Tiutage fakte komenciĝis la „granda silento". Mi memoras, ke mi pensis hejmenire: Mi revenos ankoraŭ ĉi tien. (Kaj tio okazis.) Mi pensis ankaŭ, ke la venko de socialismo venos post multaj malvenkoj, devioj, luktadoj-bataladoj, kaj ke ni, adeptoj de la Internacia Lingvo esperu la definitivan venkon de Eo ĝuste de la tutmonda stabiliĝo de la socialismo, (Kaj ankaŭ ĉi tio okazos.)

DISKUTO

J. Baghy—V. Benczik*

Legante la kejerojn de Hungara Vivo, iom mire mi tie trovis, ke furiozetas polemiko, ĉefe inter hungaroj, pro la artikolo de V. Benczik pri J. Baghy en „Sennacieca Revuo". Mi mem, kiam „Sennacieca Revuo" alportis al mi tiun eseon, sentis, ke iom da freŝa aero eniris nian tradician rutinon. Mi konstatis, ke Benczik aplikis al unu el niaj literatoroj la samajn kriteriojn, kiujn oni ordinare aplikas en beletraj studrondoj de kiu ajn alia kulturlingvo. Tamen, dum tiu polemiko ŝajnis interhungara afero, mi volis nur plu vidi la elvolviĝon. Sed jen, mi ĵus ricevis la kajeron 4/69 de H. V., kies frontartikolo estas subskribita de W. Auld kaj en kiu temas pri la afero J. Baghy—V. Benczik. Do min jukis deziro aldoni ankaŭ alian voĉon.

Ŝajnas al mi, ke V. Benczik agis tute korekte kaj honeste, ĉar jam estas tempo, ke ni rompu la magian ringon nin enfermantan kaj ni elpaŝu kun seriozaj valorjuĝoj; jam estas tempo, ke ni ĉesigu la internian incensadon kaj kuraĝe, respondece laŭiru kun la tempaj fluoj, se ni volas neperei pro malsaniga endogamio aŭ esti akuzataj pri beletra incestado.

J. *Régulo*

ESTIMATA REDAKCIO! — Traveture Hungarion mi hazarde povis aĉeti la revuon Hungara Vivo 2-a numero. Enkonduke Mihály Gergely tre ĝuste parolas pri problemoj de esperantismo. Ankaŭ mi dezirus al tio doni kelkajn rimarkojn. Bedaŭrinde multaj homoj scias pri la lingvo nenion, aŭ nur tre malmulte, ĉar ĝi ne havas sufiĉe de publikeco. Pro tio mi proponas, ke unuafoje en radio kaj televizio ĝi ricevu publikecon, tiel ke semajne dufoje estus tie aranĝita esperantlingva kurso, krome laŭorde diversaj prezentadoj ...

Král'ova u. 14. Lučenec, Slovensko.

Pavel Kotmanik

*

NOVIĜI — Mi intence ne skribis: renoviĝi, ĉar tion povas nur, kio jam estis «nova». Nia movado, bedaŭrinde, neniam estis nova (en la senco moderna), almenaŭ ne sufiĉe nova.

Parolante pri la kompleksa termino Esperanto ĉi-kaze ni devas nepre dispartigi ĝin je la tri branĉoj, kiuj konsistigas ĝin: lingvo, literaturo kaj movado. Ĉi tri komponentoj dialektike interkompletiĝas: la valoro de la tuto dependas de la interna harmonio de la komponenta trio. Se nur unu el ili ne evoluas paralele, fiaskas la tuto. Mi ripetas mian (jam kelkfoje ripetitan) opinion: la kaŭzo de stagnado ĝis nun estis kaj ankaŭ estas la fakto, ke la movado neniam povis leviĝi ĝis la nivelo de la lingvo kaj literaturo. Eĉ: la primitiveco de la movado ĉiutempe malhelpis iaforme la rektlinian evoluadon de la lingvo kaj ĝia literaturo, provante ilin mumiigi en la embria stato. Nur dank' al la inteligenta kaj klera sinteno kaj konsekvenca klopodo de la plej eminentaj verkistoj kaj lingvistoj la *lingvo* kaj la *literaturo* leviĝis ĝis universitata grado, spite al la regresema agado de movaduloj.

La *movado*, bedaŭrinde, ne sekvis la progresojn de la aliaj du komponentoj. Oni ĝenerale protestas ofendite, se la neesperantistoj akuzas la movadon pri sekteco, primitiveco, diletantismo, kvankam oni devus alie akcepti tiun kritikon, pli memkritikeme Nu, la taskoj denombritaj de M. *Gergely* estus taskoj movadaj. Laŭ mia opinio, ĉe la nuna stato de la aferoj, pluraj deziratajn celoj aspektas tute utopiaj, ĉar la nuna movada strukturo: *a)* ne volas kaj ne kapablas larĝigi la kadrojn; *b)* ne volas kaj ne kapablas aperigi informilon pli elastan, instruan kaj allogan ol al nuna; *c)* ne povas kapti la intereson kaj favoron de vasta parto de la hungara sciencularo.

Konkludo: La taskoj, indikitaj de la ĉefredaktoro, estas pli ol aktualaj, sed solveblaj nur, se la movada organizaĵo almenaŭ alproksimiĝas al la nivelo de la lingvokulturo kaj literaturo. Sen tio la taskoj restos nur piaj deziroj.

dro sz-i

* Kvankam ni intencis jam fermi la diskuton pri la Baghy-eseo de Benczik, ni ne povas ne doni lokon al la alsendita alparolo de J. Régulo Pérez. Pro teknikaj kaŭzoj ni devis mallongigi la tekston; tial ni publikigas nur la parton rilatantan senpere al la diskuto pri J. Baghy. *Red.*

NUR POR VIRINOJ

Svata servo laboranta per komputero

En la fino de la pasinta jaro komencis en Budapeŝto sian laboron la vivkunul-serĉa servo „Kvar Sezonoj". En la unuaj ses semajnoj de ĝia funkciado jam pli ol dumil personoj prezentis sin ĉe la juna institucio, kaj el ili jam estas registritaj la detalaj indikoj kaj la imagaĵoj pri la estonta vivkunul(in)o de kvincent individuoj.

La prezentiĝantoj havas aĝon tre diversan: inter 19 kaj 79 jaroj. Tiel same variaj estas ilia karaktero kaj ilia imagaĵo pri la estonta kunsortulo; tiamaniere oni tuj povas refuti la ĝeneralan opinion eraran, ke la homoj serĉantaj vivkunulon tiamaniere aŭ per gazet-anonco, povas esti nur korpe aŭ anime difektaj, inhibiciaj viroj aŭ virinoj.

— Nu, ĉi tion mi povas refuti per faktoj — deklaras la simpatia (cetere sepinfana) psikologino. — Ĉi tien venas ja plejparte homoj korpe-anime sanaj, kies cirkonstancoj socialaj kaj loĝejaj ne diferencas de la mezaj.

— Kio do ilin devigas je tia malkonvencia parul-elekto?

— La gejunulojn precipe tio, ke en sia societo ili ne trovas vivkunulon seriozan, konforman al siaj pretendoj. Parton el ili kondukas al ni ankaŭ tiu deziro, ke sian estontan parulon ili elektu ne nur laŭ ekstera plaĉo, aŭ sentimentaj motivoj, sed — kiel ajn surprize tio efikas — ankaŭ helpe de scienca personecesploro aplikata en nia institucio. Ili mem submetas sin al tia ekzamenado. — La mezaĝaj soluloj estas de pli malavantaĝa situacio, ĉar, eĉ se ili havas societon, la plimulto de ilia aĝoklaso estas geedziĝinta, havas familion. Tiamaniere, precipe la sorto de la mezaĝaj solecaj virinoj estas trista. Se nome ili rilatas amike kun familioj, facile pro ili jaluziĝas kelkaj edzinoj, kaj se ili vizitas amuzejojn solaj, ilin ĝenas antaŭjuĝoj aŭ malrektaj intencoj. Ankoraŭ pli malfavora estas la edz(in)iĝa ŝanco de la pli maljunaj soluloj. Jen kial ili turnas sin al ni.

— Kio estas la esenco de la scienca parul-elekto?

— Laŭ aparta deziro, ni demonstras ankaŭ per personec-esplora testo la „karakter-mapon" de la parulserĉantoj kaj de la personoj al ili rekomendeblaj, kaj ni konigas al ili iliajn reciprokajn pretendojn. Por ties faciligo ni uzas ankaŭ elektronikan komputeron, kiu — baze de indikoj fiksitaj sur truitaj kartoj — elserĉas la pleje interkonformajn parojn. Poste ni faras ĉe la elserĉitoj ankaŭ psikologian analizon, kaj baze de ĉio ĉi ni rekomendas al nia komisiinto la proponeblan personon — unuafoje nur kun portreto kaj kun la necesaj informoj. Se la rekomendato ne plaĉas, en ses monatoj ni povas rekomendi ankoraŭ kvar aliajn personojn. Poste jam ni entreprenas pluan parul-elekton nur je nova komisio.

— Kaj la amo?

— Nia metodo tute ne ekskluzivas, ke ĉe la gejunuloj disvolviĝu vera amo kaj, ĉe la pliaĝuloj, sincera estimo kaj reciproka ŝato. Ja, multfoje, ĝuste la frue kaj reciproke ekkonitaj karaktertrajtoj povas maturigi profundajn kaj daŭrajn sentojn.

La „Kvar sezonoj" do havas perspektivojn ankaŭ en nia lando; multaj interesiĝas ne nur el la ĉefurbo, sed ankaŭ el la provinco, multope troviĝas ja solecaj virinoj kaj viroj. Kaj krom ili, eĉ hungaroj elŝiriĝintaj eksterlanden jam anonciĝis, serĉante patrujan vivkunulon.

Imre *Szenes*.

„Vesto homon prezentas"

— opinias la plimulto de la virinoj preteratentante la oponan saĝon: „Valoras ne la vesto, valoras la enesto". Temas pri la modo. La vorton „modo" eble estus pli dece skribi per majusklo, ĝi ja estas potenca kaj kaprica diktatoro, kiu kaŭzas multajn zorgojn al la virinoj kaj gravajn elspezojn por la viroj.

En Budapeŝto reĝis ankoraŭ la morna vintra vetero, kiam la modkreintoj aranĝis modrevuojn kaj prezentis la somerajn modelojn de 1970.

La ĉefa problemo: „Ĉu mini- aŭ maksi-jupo". La kreintoj — konsiderante ankaŭ la eksterlandajn modotendencojn — planis ambaŭ. Alia grava ŝanĝo estas spertebla ĉe la talio. Finiĝis la modo de la „rekta linio". La jasonoj klopodas reliefigi la silueton, do ĉe la talio ili estas sveltigitaj kaj ekde la koksoj larĝiĝas. La ŝatata faldumita jupo denove enmodiĝis. La tajloroj volonte aplikas poŝojn eĉ sur vesperaj roboj. Ĉiaspecajn vestaĵojn ofte ornamas popoldevena brodaĵo. Tre ŝatata estas la jaketo kun pantalono: ĝi pretiĝas el diversaj ŝtofoj kaj la virinoj — sendepende de aĝo — ĝin portas hejme, surstrate kaj ankaŭ en la teatro. Sendube tiu ĉi kostumo estos la furoraĵo de la sezono.

Inter la teksaĵoj troviĝas multe da nilonaj kaj silkaj ŝtofoj. La kvadratitaj kaj striaj ŝtofoj estas precipe ĉarmaj. Rilate la kolorojn: la flava-blanka, ruĝa-blanka kaj bananverda-blanka kolorkombinoj regas, sed troviĝas ankaŭ ĉiuj nuancoj de la roz-koloro ĉefe inter la trikotoj.

Fine, la sensacio de la modo de 1970: bankostumoj el ledo. Jes, el ledo.

Oni povas konstati, ke la ĉi-jara alloga virina modo kompare al la pasintjara montras fortan ŝanĝon. Ankaŭ tio estas konata, ke eĉ la serpento ne reprenas sian deĵetitan haŭton. Ne surpriziĝu do la edzoj, se la virinoj antaŭ la sezono malfermos la vestoŝrankon, kaj — kiel en ĉiu jaro — ankaŭ nun riproĉe deklaros: „Mi ne havas eĉ unu ĉifonon surmeteblan!"

—eta—

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO PRI PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO
BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128. TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5. CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128. TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128. TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST

Dr. Otto Haszpra

Pri kvinkontinenta vojaĝo de inĝeniero

Esploringeniero de VITUKI (Akvomastruma Esplorinstituto, Budapest), mi pasigis, kiel stipendiulo de la Ford-fondumo, unu jaron en eksterlanda studvojaĝo. El faka vidpunkto plej gravaj por mi estis la monatoj pasigitaj en la Hidraŭlika Esplorinstituto de la Universitato de *Iowa:* mi faris tie esplorlaborojn pri modelumado de vibroj en hidroteknikaj konstruaĵoj. Speciale memorinda estas ankaŭ mia partopreno en la Internacia Hidrologia Kongreso en *Tucson*, Arizono. En la lastaj du monatoj (majo kaj junio de 1969) mi vizitis multajn esplorinstitutojn kaj universitatojn kaj turismajn vidindaĵojn, revojaĝante hejmen tra Pacifiko, Novzelando, Aŭstralio, Sud-Azio kaj Sud-Afriko, Tiel ne nur pri mia fako mi akiris multe da scio kaj da impresoj, sed ankaŭ pri la vivmaniero, kultura, ekonomia kaj politika situacio de la tieaj popoloj. Mi havis okazon fari multe da lekcioj pri la esplorrezultoj propraj kaj pri tiuj de la hungaraj hidraŭlikaj esploradoj. Multaj institucioj kaj personoj diverslandaj min helpis sukcese fini mian sciencan programon kaj realigi mian ĉirkaŭgloban vojaĝon, antaŭe apenaŭ sonĝatan.

Ne lasta inter miaj helpoj estis la bonvolo kaj aktiveco de pluraj esperantistoj, antaŭe tute nekonataj. Mi esprimas al ili ĉiuj mian sinceran dankon. Sed mi rimarkigas, ke nenia helpo povas plene kompensi la propran fortostreĉon de la vojaĝanto mem: la proponiĝantajn eblaĵojn oni povas utiligi nur per la plej forta volo.

Multajn samideanojn mi ekkonis, en la duono de la vizitataj landoj mi partoprenis esperantistajn klubkonvenojn kaj kontribuis al tiea programo per prezentado de lumbildoj pri Budapeŝto kaj per informoj kaj rakontoj pri la hungara popolo kaj ties historio.

Mi parolas la anglan, la plej disvastiĝintan lingvon, do mi ne devus havi malfacilaĵojn en la plejmulto de la travizititaj landoj, kie la gepatra lingvo aŭ la dua fremda lingvo estas la angla. Nu, tio estas pli-malpli vera, se temas pri la plej altgrade edukitaj homoj, kvankam ankaŭ ĉe ili ekzistas la tubero de la dialekta diverseco. Sed koncerne la homojn mezajn: la eksterlandano povas ĝoji, se li komprenas la duonon de ilia parolo. Kie la angla ne estas la gepatra lingvo de la landanoj (Meksikio, Hong Kong, Hindujo, Etiopio, Arabaj landoj), tie la angla utilas nur ĉe dogan-oficistoj, turist-agentejanoj, hotel-personaro kaj alte edukitaj homoj. Surstrate vi estas kvazaŭ surdamuta.

Sed okazas, ke eĉ »samlingvanoj« ne komprenas reciproke sian lingvon. En Hong Kong la urbloĝantaro parolas la kantonan dialekton de la ĉina. Mi vidis filmojn en la honkonga TV, en kiuj la aktoroj parolis aŭ la oficialan aŭ la kantonan ĉinlingvon kaj sur la ekrano iliaj vortoj estis projekciitaj en ĉinaj ideogramoj, por ke la ĉinoj komprenu la ĉinan parolon.

Ĉie oni povas vidi, ke plene mankas la lingva egalrajteco por tiuj, kies lingvo gepatra ne estas la oficiala landolingvo. Tio koncernas ne nur la enmigrintojn, sed ankaŭ la praloĝantojn (indianoj kaj havajanoj en Usono, indianoj en Meksikio, maorioj en Novzelando, multaj gentoj en Hindujo, la ne-amharaoj en Etiopio). Ekzemple, en Novzelando la maorioj principe havas la samajn rajtojn kiel la eŭropodevena plimulto, sed la samajn poziciojn kaj vivnivelon ili ne povas atingi, ĉar dum la maoria infano batalas kun la lernata angla lingvo, liaj anglalingvaj kunuloj havas tempon lerni praktikajn konojn, necesajn por sia kariero. Do por la maorioj estas du alternativoj: resti maorio, do principe samranga sed praktike duaranga civitano, aŭ tute angliĝi en iu generacio kaj tiel disŝiri ĉiun ligilon kun siaj prauloj kaj gentanoj.

Kompreneble, ĉi tio estas loka problemo, sed similaj ekzistas tutmonde. Eĉ, oni povus diri, ke la lingvanoj de malgrandaj nacioj mem estas tiaj maorioj en la internacia areno. Kaj por sciencaj celoj oni jam devas scii almenaŭ kvar lingvojn, volante orientiĝi en sia fako. Por turismaj celoj, se oni ne volas esti kaptito de turismaj agentejoj, necesas tiom da lingvoj, kiom da popoloj oni volas elkoni pli profunde. Kaj ĉar la eblo kaj neceso de internacia kontaktiĝo evoluas rapidege, estas evidente, ke nia futuro estos aŭ akcepto de unu komuna lingvo aŭ postulo de scio de cento da diversaj lingvoj kontraŭ ĉiu homo-mizerulo. Ekonomiaj konsideroj kriegas por unu lingvo, egalrajteco postulas, ke tiu lingvo ne estu lingvo etna. La konkludo doniĝinta per si mem estas Esperanto.

La unua hungarlingva gazeto

Nuntempe en nia lando aperas 400 hungarlingvaj gazetoj, magazinoj kaj revuoj. — La unua hungarlingva gazeto komencis aperadi antaŭ 190 jaroj en 1780, kun titolo *Magyar Hírmondó* (Hungara Heroldo) en *Pozsony* (nun *Bratislava* en Slovakio). La gazeto aperis ĉiusemajne du fojojn, merkrede kaj sabate. Komence ĝi havis 320 abonantojn, poste 500. Tri ekzempleroj de la gazeto estis senditaj al Madrido, kvin al Francio kaj pluraj al Nederlando. La redaktoro, Matiaso *Ráth*, sendis sian gazeton al nekredeble multaj lokoj laŭ la tiamaj cirkonstancoj: al 103 urboj aŭ vilaĝoj de Hungario. La rubrikoj de la gazeto havis tiajn titolojn: Eksterlandaj historioj, Miksaj aŭtentikaj sciigoj, Dubaj aferoj, Hejmlandaj historioj.

Niaj zorgoj hungarlandaj

Je la fino de la dua mondmilito, post la liberiĝo de nia lando ni komencis kun granda entuziasmo, espero kaj kredo rekonstrui nian landon kaj konstrui novan ekonomian kaj socian ordon. Ni rekonstruis la eksplodigitajn pontojn, la domojn, fabrikojn detruitajn de bomboj, ni konstruis novajn hospitalojn kaj lernejojn. La senbienaj kamparanoj ricevis agron, la fabrikoj kaj bankoj fariĝis propraĵo de la popolo.

Komenciĝis tiam ankaŭ la transformado de la vid- kaj pensmaniero, la luktado kontraŭ malhumanaj kutimoj hereditaj, kontraŭ krueleco, egoismo, monavido, superstiĉoj k. t. p. Ni opiniis tiam, ke la venko super la damaĝaj fantomoj de la pasinteco estos facila kaj rapida. Nun ni devas konstati, ke dudek kvin jaroj en la renoviĝinta Hungario ne povis plene ĉesigi la malbonajn proprecojn de la homoj.

Ofte ĉikanas nin bagatelaj malagrablaĵoj, sed kelkfoje ĉagrenas nin ankaŭ akraj misuzoj kaj eraroj.

Pasintjare porbebaj sukĉiloj ne estis haveblaj en la butikoj en sufiĉa kvanto dum kelkaj monatoj, ĉar burokratoj de du entreprenoj tro longe disputadis, ne povante decidi, kiu el ili surprenu la taskon de la produktado.

Ofte ni ĉagreniĝas, kiam vendistino malĝentile priservas nin (kaj kiel ofte ni mem estas senpaciencaj kontraŭ aliaj!). Kiel ofte ni koleriĝas pro la malatentemo de oficialuloj, kiuj, ekzemple, aŭtune malfermigas la pavimon de la strato, sur kiu ni ĉiutage iras, kaj daŭrigas la laboron nur printempe. Printempo venas, oni metas la novan gaskondukilon, fermas la pavimon kaj post kelkaj semajnoj oni denove malfermas ĝin por meti novan akvokondukilon.

Antaŭ kelkaj jaroj oni rekonstruis la Sudan Stacidomon en Budapeŝt. Nun estas jam pretaj la novaj planoj por denova rekonstruo kaj plilarĝigo.

Kien ajn oni iras en la mondo, oni trovas rekonitajn scienculojn hungardevenajn, muzikistojn, sportistojn, inventistojn, esploristojn, kiuj rajte fieras pri bonegaj rezultoj. Hejme ni tamen ofte aŭdas kaj legas pri vana luktado kontraŭ la nekompreno de burokratoj, ĵaluzaj sentalentuloj. Multe da inventaĵoj kaŝiĝas en tirkestoj de la inventintoj, aŭ en tiuj de kompetentuloj indiferentaj.

Hungara inventisto konstruis novan plugilon, la t. n. rulplugilon, kiu dispecigas la teron pli efike, ol iu ajn plugilo iam uzita. Alia inventisto konstruis akrigmaŝinon pli bonan, ol la plej bona en Hungario. La enkonduko de la rulplugilo kaj akrigmaŝino estis (eĉ ankoraŭ nun estas) malhelpata.

Feliĉe, ke la plimulto de la socio pli kaj pli kondamnas la burokratojn, indiferentajn sentalentulojn kaj misvolulojn.

Gábor VIGH

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

IBUSZ

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotel ambro-rezervado
Aran o de pasport-kaj enirvizoafero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ĵipo kaj trajno

Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en voja aferoj

IBUSZ AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LA LANDO

REPREZENTEJOJ:
ĉe limistacioj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj elsterlande[8]

Amsterdamo	Moskvo	Romo
Berlino	Otavo.	Saopaolo
Bruselo	Parizo	Stokholmo
Frankfurto	Prago	Vieno
Londono	Riodeĵanejro	

Oni fondis en Usono la unuan Kodály-Instituton

En la Usona urbo *Wellesley*, proksima al *Boston*, estas fondota *Instituto Kodály*. Miss *Denise Bacon*, direktoro de *Dana School of Music*, anoncis tiun decidon en la ferma soleno de ses-semajna kurso, aranĝita por 150 muzikinstruistoj de Usonaj kolegioj, lernejoj, infanĝardenoj. La Instituto celas prepari la adaptadon de la muzik-eduka sistemo de Kodály al la diversaj infan-edukejoj. Por tio ili deziras krei kun hungaraj muzikpedagogoj interligon ankoraŭ pli striktan ol la ĝisnuna. Laŭ hungara modelo, Usonaj muzikologoj komencas ordigi la ĝisnune kolektitajn amerikajn popolkantojn kaj ilian preparon por muzikaj celoj. En Usono nun komenciĝas tiu muzika sed pli vastasence ankaŭ ĝenerala pedagogia procezo, kiu por ni fariĝis natura kaj nemalhavebla parto de nia edukado en la praktiko de kvindek jaroj.

„Nur el fonto pura" deziras ĉerpi la Usona Instituto. Oni projektas prepari, per intensaj studoj de la hungara lingvo, de solfeĝo kaj de metodiko, jare 4—6 Usonajn kantinstruistojn por tio, ke ili povu alproprigi en Hungarlando la pli altnivelajn konojn teoriajn kaj praktikajn. La unuajn paŝojn por tio ili faris en la kurso de Dana School of Music, kie la prelegojn tenis ekskluzive prelegantoj invititaj el Hungarlando: *Erzsébet Szőnyi*, Muzik-Akademia profesorino; *Katalin Forrai* kaj *Klara Kokas*, sciencaj esploristoj, *László Vikár*, kandidato ĉe Akademia Popolmuzikesplora Grupo kaj *Peter Erdei* Altlerneja muzikprofesoro.

La Usonaj eduk-ekspertoj klare vidas, ke necesas didaktika, lerneja reformo. La apliko de la Kodály-metodo povas esti la unua paŝo en tia direkto, kaj ĝi povas fariĝi bazo de pli larĝa kaj ĝenerala reformo.

Márta Sárvári.

Hungaraj muzikaj sukcesoj en eksterlando

La diskutoj pri la taŭgeco kaj utileco de la muzikaj konkursoj ankoraŭ ne finiĝis. Multaj argumentoj balotas por ili, aliaj neas ilian neceson. Sed oni neniam devas perdi el la vido la gravan fakton, ke la partoprenantoj de la muzikaj konkursoj estas ĉiuokaze junaj muzikartistoj kaj la aŭskultantoj estas same junaj, lernantoj kaj amantoj de la muziko. Budapeŝto kiel urbo de muzikaj konkursoj estas bone konata en larĝaj rondoj de la fakuloj. Multaj junaj muzikistoj veturas al la muzikkonkursoj en la ĉefurbon de Hungario kaj la gajnitaj premioj, kvankam ne tre altaj sumoj, estas alte taksataj kiel pruviloj de la alta nivelo de muzikarta scio.

Nun mi volas per kelkaj trajtoj prezenti junajn hungarajn muzikartistojn, kiuj ne nur en sia patrolando, sed ankaŭ eksterlande havis bonajn sukcesojn en muzikaj konkursoj.

Imre Antal *apartenas al la plej „aĝaj" junaj hungaraj pianistoj. Li naskiĝis en la jaro 1935. En multaj konkursoj li gajnis premiojn, ekz. ĉe la Mondaj Junularaj Festivaloj de muziko en Vieno, Bolzano kaj Helsinki, en la Casella-Konkurso, en la konkurso en Rio de Janeiro ktp. En la Budapeŝta muzikkonkurso li ricevis la duan premion en la jaro 1966. (La unuan premion oni ne aljuĝis.)*

Eszter Boda *estas violon-virtuozino. Ŝi gajnis la unuan premion en la Konkurso Flesch en Vieno kaj poste donis multajn koncertojn en Britujo, Polando, Germanaj Demokrata kaj Federacia Respublikoj ktp.*

József Deme *estas kantisto kaj atingis premiojn en la junularaj muzikkonkursoj de Helsinki, München kaj Ĝenevo.*

Interesa kantistino estas Julia Hamari, *precipe pro tio, ke ŝin allogas antaŭ ĉio la malfacilaj problemhavaj artaj taskoj. Post la atingo de la unua premio en la Budapeŝta Muzika Konkurso en la jaro 1965, ŝi donis koncertojn en la Salzburga Festivalo, en Italio, Britujo, Svedujo kaj Hispanio. Krom ĉi tio ŝi ofte rolis kiel kantisto de gramofonaj diskoj ĉe Deutsche Grammophon—Gesellschaft, Electrola kaj Eucord.*

Gyula Kiss *gajnis la unuan fojon la duan premion en la konkurso en Budapeŝto per sia pianista arto, poste li gajnis la unuan premion en Taormina. Ankaŭ li faris ampleksajn koncertvojaĝojn.*

La fortepiano-virtuozo Erika Lux *gajnis kelkfoje premiojn en muzikaj konkursoj, lastfoje ŝi atingis la unuan premion en la konkurso de la radio en München en la jaro 1969.*

László Mező *estas violonĉelisto. Li gajnis premiojn en Praha, Moskvo, en la Mondjunulara Festivalo en Helsinki (1962), kaj akiris la unuan premion en la konkurso Casals en Budapeŝto en la jaro 1965. Li donis koncertojn en preskaŭ ĉiu lando de Eŭropo.*

Alia violonĉelisto estas Miklós Perényi. *Li ricevis sian diplomon de la Academia Santa Cecilia en Romo en la jaro 1963. Li daŭrigis siajn muzikajn studjarojn ĉe la mondfama violonĉelisto Pablo Casals. En la Budapeŝta muzika konkurso je honoro de Pablo Casals li gajnis la duan premion.*

Zsuzsa Pertis *gajnis kiel pianisto la duan premion en la muzika konkurso de Bruges en la jaro 1968. (La unuan premion oni retenis.)*

Dezső Ránki *estas eble la plej juna muzikartisto inter la junuloj, ricevintaj muzikajn premiojn. Li estas 18-jara, sed tamen gajnis jam unuan premion en la internacia Schumann-Konkurso en Zwickau per sia eminenta fortepiano-ludo.*

Ĉi tiu okulfrapa serio de internaciaj muzikaj sukcesoj de junaj hungaraj muzikartistoj ne okazis sole dank' al la granda nombro de muzikaj talentoj en Hungario, sed almenaŭ saman rolon ludas la bona laboro de la hungaraj muzikpedagogoj. Ĉar junaj homoj neniam fariĝas tiaj, kiaj ili estas, sen agado de pedagogoj. La granda parto de la junularo montras klare la pedagogian nivelon de iu lando.

La multnombraj eksterlandaj muzikaj sukcesoj laŭdas do ne lastavice la muzikinstruistojn de Hungario, ne nur la profesorojn de la Altlernejoj, sed ankaŭ la instruistojn de la malgrandaj vilaĝaj lernejoj.

Lajos LESZNAI

La falsa aŭguro

Sándor Szathmári

La grandmonarko de *Atlia* sendis voki sian intimulon *Serva*, la ĉefon de la kortega konsilio.

— Nun — li diris, — kiam la popolo de nia lando festas la dekan jaron de nia regado, oni nepre intencas omaĝi al ni donacojn grandiozajn. Sed tion vi scias pli bone ol ni.

— Ho jes. La Templon de la Dankodiro, la Obeliskon kaj vian Statuon.

— Ni dankas, ne daŭrigu. La planojn ni konas bone. Ni vokis vin tial, ĉar ni sentas, ke ankaŭ nia patra koro devas iom rekompenci la popolon por ĝia fideleco kaj donacemo. Ĉu ne?

— Via popolo jam nun fermis vin en sian koron, ho reĝo, filo de la dioj!

— Nu jes, tion ni scias. Sed des pli konvene estus, ke ankaŭ ni donacu ion al la popolo.

— Ĉu vi pensus pri ia speco de monumento aŭ templo, ho reĝo dio-generita?

— Eh, ne pri tiaĵoj, kiuj kostas multan monon. La popolon jam pli ol sufiĉe ŝarĝas ĝiaj propraj donacoj. Kial ĝin ŝarĝi ankaŭ per la niaj?

— Senlima estas la boneco de via koro, ho diogenerita reĝo!

— Ni pensis pri amnestio al la malliberuloj.

— Kiel do, grandmonarka moŝto! — timiĝis Nerva. — Ĉu vi liberigus eĉ vian iaman kuiriston, kiu ŝtelis vian or-pokalon?

— Nu, kompreneble, ni ne pensis pri li. Ĝuste tial ni sendis voki vin. Ni volas vin komisii, ke vi priesploru en la ŝtataj malliberejoj, kiu, kial kaj kian punon ricevis. Ni vin komisias priesplori per via saĝo kaj fidelo, kiu povos ricevi amnestion aŭ pun-malpliigon. Sed ni pensas, ke vi jam aŭdis kaj komprenis ĉion. Iru do fari vian taskon.

*

— Nu, nia kara servisto, provoso Patra, donu al mi la liston de la malliberuloj!

Patra alportis la liston kaj genuflekse ĝin transdonis al la ĉefkonsilisto Serva.

— Do ni iru laŭvice. Jen estas: „Brut, rabisto". Liaj kulpoj?

— Li rabmurdis malriĉajn komercistojn dum la foiro.

— Ĉu nur tiaj bagateloj?

— Jes. Sed foje li atakis ankaŭ grandsinjoron Ptalm, nian noblan bonfaranton, luanton de la kortegaj bienoj (nun Patra ree genufleksis kaj tuŝis per sia manplato sian frunton, signante altegan honoron). Sed kiam li eksciis, kiu sidas en la veturilo, li forkuris kiel freneza.

— Jen lia feliĉo. Amnestion al li. Plue. Sekvas Talme. Kion li krimis?

— Li spionadis komisiite de la lando *Antissa*. Li penetris ŝtele en aristokratajn rondojn, ŝtelakiris militajn sekretojn kaj elliveris ilin al la registaro de Antissa.

— Hm. Pli grava afero. Kiom estas lia puno?

— Dumviva mallibero.

Ĝi mallongiĝu en du jarojn. La tria estas Rata. Kion li faris?

— Vi eble scios tion, kvankam ni devis tion sekreti. Li estas la falsa aŭguristo.

— Jes, mi memoras pri io . . . landpereo, drono en Oceano . . .

— Jes, jes. Pri la murmuroj, kiuj antaŭ du monatoj aŭdiĝis el sub la tero, niaj aŭguristoj deklaris unuanime, ke ili estas dia revelacio: dio Kantra koleras kaj atentigas nian landon, ke li ne toleros plu la impertinentecon de *Antissa*, li postulas, ke ni ekstremu ĝian popolon. Tial nia grandmonarko ordonis tiam armadon kontraŭ tiu lando.

— Jes, — diris Serva. — Mi scias eĉ, ke Rata havis ian opinion kontraŭan. Kion li diris?

— Mi ne miras, grandsinjora moŝto, ke vi ne scias tion precize, kvankam vi scias ĉion. Sed estis severa ordono malhelpi la disvastiĝon de la danĝeraj doktrinoj de Rata. Eĉ la plej altrangaj moŝtoj apenaŭ ricevis informon pri tio.

— Kion do li asertis?

— Tion, ke la murmuro ne devenas de la kolero de dio Kantra, sed ĝi estas spontana ter-murmuro. En la terprofundo estis grotoj; ili enfalis, kaj ties bruon ni aŭdis. Li aŭdacis deklari, ke nia kontinento post du monatoj malaperos en la oceanon. Do ni ne armadu, sed prefere ni interpaciĝu kun Antissa.

— Terura defetismo!

— Sed, feliĉe, niaj altaj instancoj tuj kontraŭagis. Niaj pastroj deklaris liajn doktrinojn herezaj, pruvis el la Sanktaj Libroj, ke nia lando firme staros ĝis la senfino de la tempoj, ĉar tiel ordonis dio Kantra, kaj ke la kolero de la dio murmuris unuavice kontraŭ tiaspecaj herezuloj. Sed poste ili rekonis, ke ĉia deklarado kaj publika diskuto estus nur reklamo por Rata kaj liaj doktrinaĉoj. Oni do lin arestis, liajn skribojn forbruligis, lin mem malliberigis, kaj nuntempe oni jam malliberigas eĉ tiujn, kiuj nur mencias tiujn tezojn abomenindajn. Kaj ĉu vi volus amnestii tiun monstron?

— Ne, ja ne, neniel! — kriis Serva. Kiel li puniĝas?

— Per dumviva mallibero.

— Ne sufiĉe! Eble li povos liberiĝi kaj plu veneni la animojn, ruinigi la patriotajn kaj religiemajn morojn, kaj per tio frakasi la kredon de la homoj je nia futuro. Oni ĵetu lin al la sovaĝbestoj en la areno. Lia morto faros pli pompa la cirkajn ludojn jubileajn!

*

Ĉi tio okazis en Atlantis, unu monaton antaŭ ĝia subakviĝo.

Esperanto-seminario apud la lago Balatono

La 6-an de novembro matene mi startis kun iom da malinklino al Balatonkenese por partopreni la tiean E-seminarion. Mi timis la monotonan vidaĵon de la aŭtuna Balatono. Sed la Hungara E-Asocio, kune kun la Fervojista Sekcio, aranĝonte unusemajnan seminarion por esperantistaj gvidantoj, trovis, ke por tiu celo Balatonkenese estas plej konvena.

Post la alveno, mia unua vojo kondukis al la lago. Se la akvo ne estas tro malvarma, — mi diris al Maria Várfi, apotekistino en Várpalota, — mi baniĝos post tagmanĝo.

Mi malsupreniris al la lagbordo, kaj trempante mian manon en la akvon, mi ĝoje ekkriis:

— Ha jen, ĝi ne estas malvarma!

Sed mia ŝuo ekglitis, kaj en la sekva momento mi jam sidis ĝiskole en la akvo. Mia amikino time ekkriis, sed mi diris al ŝi trankvilige:

— Fakte, ĝi tute ne estas malvarma!

Poste, vidante ŝian vizaĝon teruritan, mi komencis ridi. Mi ridis, ridegis tiel, ke mi longe ne povis stariĝi. Fine mi elvenis, iris en mian ĉambron tramalseke, sed eĉ nazkataron mi ne akiris.

Tiel do komenciĝis por mi la seminario. Ĝin karakterizis vigleco, bonhumoro kaj intimeco. Nia gastiganto, Szilárd Bálint *prezidis la prelegojn; ili sekvis unu la alian tra 3—4 horoj, kaj antaŭ- kaj posttagmeze, interrompate per dekminutaj paŭzoj „sanitaraj".*

La 7-an de novembro ni festis kune la 52-an datrevenon de la Granda Oktobra Revolucio kun la festparolado de Béla Berceli, *ĉefsekretario de HEA kaj kun la deklamo de István* Torma. *Vespere ni vidis du filmojn: „La vivanta Lenin" kaj „Esperanto-fonto".*

En la seminario prelegis dro István Bácskai, *Emília* Radvánszky, *István* Keller, *Klára* Varga, *dro Lajos* Márton, *Erzsébet* Pallós *kaj Gábor* Vigh *pri la teorio kaj praktiko de la gvidado, laboro en la E-grupoj, instruado de Eo en fabrikoj, rolo de sindikatoj en la socialisma vivo kaj en la E-movado, graveco de la junulara movado kaj ties kontakto kun aliaj junular-organizoj, Eaj pacmovadaj taskoj, financaj aferoj, propagand-metodoj ktp. Sed pleje furoris la literaturaj kaj movadhistoriaj prelegoj de prof. Lajos* Kökény *kaj liaj anekdotoj pri famuloj. La devon de dommastro plenumis Szilárd* Bálint, *grandsukcese, kvankam la tasko — temis ja pri pli ol 70 gastoj — ne estis facila. Krom li, ankaŭ al la ĉiam oferema László* Zseni *ni povis danki la perfektajn pretend-kontentigon kaj komforton. Kaj ni ne forgesu pri la vetero, kiu superis la plej belajn esperojn.*

Krom la „pli-frue-naskitoj" ankaŭ multaj gejunuloj partoprenis la seminarion: vere ĝojinda afero. Por inde fini la lernadon, kaj por kulminigi ties agrablon kaj gajon, oni aranĝis adiaŭan vesperon. Ties surprizo estis, ke oni projekciis sur ekranon nian tiean vivadon ekde la alveno; oni nome estis filminta ĉiun interesan fazon, ĉiun eventon de nia kunesto. Fine ni dankis la estraron, petante, ke venontjare la seminario daŭru du semajnojn. Post la programo sekvis danco, kanto, babilado, kaj kiam multaj jam finis la amuzon kaj iris dormi, ilin serenadis la junuloj ĝis tagiĝo.

En la mateno de la forveturo, la lago surprizis nin per belega vidaĵo. La antaŭan nokton forte ventis, kaj sekve de tio, en la jam preskaŭ senventa mateno la lago ĵetis baŭmantajn, akvofale reĵetiĝantajn ondokrestojn, brilantajn en la fortaj sunradioj, fajrerantajn en ĉiuj koloroj de la ĉielarko. Tio estis timiga kaj nedireble bela; nenia maro povas prezenti pli grandiozan spektaklon. Mansigne mi adiaŭis ĝin el la trajnofenestro:

— Ĝis la revido, maro hungara!

Mária Faragó

En kio ni similas la francojn?

La Pariza *Les Echos* ĵustempe konigis studon, kiun kunlaborantoj de la *Franca Konsum-esplora Instituto faris*, komparante en ĝi la formiĝadon de la Hungarlanda kaj Francia konsumado. La interesa studo tiras du gravajn konkludojn. Unue, ĝi konstatas, ke ekzistas konkreta eblaĵo por tio, ke oni esploru kompare la konsumadon en landoj de malsama socia sistemo. Due, ĝi demonstras, ke, kvankam la aĉetpovoj kaj la konsum-kutimoj havas inter si evidentajn diferencojn, la konsisto kaj la evoluo de la konsumado surprize kaj eksterordinare similas en pluraj rilatoj.

La bazo de la esploroj estis la jaro 1964. Tiujare, laŭ la studo, la elspezoj por manĝoj kaj trinkoj estis en la hungaraj hejmomastrumoj la 47%-oj, kaj en la francaj la 35,8%-oj de la tuta elspezo. Por daŭraj mastrum-ekipaĵoj elspezas la hungaroj 5,8%-ojn, la francoj 4,9%-ojn. Por aĉeto de radioaparato, televidilo, magnetofono, fotoaparato kaj similaj la hungaroj oferas 1,5%-ojn, la francoj 1,7%-ojn. La vestoj kostas po hejmomastrumo en Hungarlando 13,4%-ojn, en Francio 11,5%-ojn. La proporcio de ŝparita mono estas en Hungarlando 4%, en Francio 7%.

La studo emfazas la surprizan analogecon laŭ la direkto de la evoluo. Ekzemple, se oni prenas 100 kiel indikon de 1960, en 1964 la aĉet-indekso de la daŭraj konsum-artikloj estis 176 en Hungario kaj 165 en Francio. La kresk-indekso de la loĝo-kostoj estis 117,5 en Hungarlando, 116,5 en Francio. La kresk-indekso de la elspezoj por puriĝado kaj korpoflego estis ĉe la hungaroj 135,2% kaj ĉe la francoj 135,1%.

Tr.: *L. K.*

DOMFABRIKO

El la parolpaneloj ni publikigas ankoraŭ 20 pecojn ĉi-numere, sed ni anoncas, ke ili estas la lastaj aperintaj en la revuo. La fabriko nome, dank' al la fervoro de Ada Csiszár *kaj de la tuta stabo, kunmetis jam la 5000-an parolpanelon, kaj evidente, ilia publikigado, eĉ en dozoj po 100 por numero, daŭrus dekduon da jaroj. Por la kontrolo de la paneloj ni elektis do alian vojon: ni sendas ilin al elektitaj bonaj lingvosciuloj de plej diversaj landoj kaj diversaj kontinentoj. Tiamaniere ni povas atingi, ke tiuj frazeologiaĵoj estu ne nur bonaj, sukaj-spicaj, sed ankaŭ facile kompreneblaj por la anoj de ĉiu lingvo. Se niaj internaciaj kunlaborantoj faros sian taskon kun kontentiga rapideco, espereble jam en 1971 ni povos aperigi la panelojn en libro por esperantistoj, kun konvena indekso, helpanta la uzanton trovi la esprimon, kiun li bezonas. Ni adiaŭas do ĝis revido.*

K. K.

131. Homo de Himalaja ambicio.
132. Vidu la mondo, kia afero!
133. Li jam faligis siajn laktodentojn.
134. Iras super li malbonaj (mavaj, sinistraj) steloj.
135. Li forneas eĉ la stelojn de sur la ĉielo.
136. Liaj okuloj vidis sparki steletojn.
137. Naskiĝi sub malfavora (sinistra) konstelacio.
138. Apoteke multekosta.
139. Tio kostos al li kare.
140. Eĉ palan konjekton ne havi pri io.
141. Esti movata per fadenoj.
142. Ĝistroe sufiĉa.
143. Pli ol multa.
144. Naniĝi ĉe (kompare al) io, iu.
145. La tuta sumo fordegelis.
146. Honesta de verto ĝis plandoj.
147. Ĉiucole homo (viro).
148. Homo staranta firme sur la plandoj.
149. Li estas mia bonvolulo.
150. Li neniam plu refariĝos homo.

Nia ex-libris-arto

La kolektado de *ex-libris*-oj havas grandan paseon. La *ex libris*, kiu origine estis destinita nur por signi la posedanton de la libro, komencis vivi memstaran vivon kaj iĝis objekto de kolektado. La kolektantoj poste kuniĝis en societoj, aranĝis ekspoziciojn kaj ankaŭ iliaj internaciaj interrilatoj evoluis baldaŭ: la plej simpla maniero de la kolektaĵ-pligrandigo estas ja la interŝanĝado. La posedanto de unu el la plej grandaj *ex-libris*-kolekto, konstru-inĝeniero Gianni Mantero en Como, Italio, proponis la unua, ke la kolektantoj el diversaj landoj, artistoj kaj amatoroj de *ex-libris*-oj renkontiĝu en internacia kongreso.

Por ni hungaroj, plej grandsignifa el la ĝisnunaj kongresoj estis la XII. kongreso en Como, antaŭ du jaroj. Ĉi tie, nome, la delegitoj el 15 landoj decidis unuanime, ke la sekvanta 1970-jara kongreso okazu en Budapeŝto. La kongreso daŭros ekde la 3-a ĝis la 4-a de septembro: tempo pleje favora por kongresado. Internacia ekspozicio



prezentos la plej belajn pecojn de la tutmonda *ex-libris*-produktado. Ni donos okazon al niaj gastoj ankaŭ por tio, ke ili elkonu nian ĉefurbon, ekskursu al Esztergom, kaj ke tiuj, kiuj delonge havas inter si interŝanĝrilaton korespondan, nun renkontiĝu en amika rondo.

Kongresa kutimo estas, ke la diverslandaj delegitaroj donas kompleze donac-mapojn al la kongresanoj; la mapoj enhavas la plej bonajn etgrafikaĵojn de iliaj plej bonaj grafikartistoj. El ĉi tio, kompreneble, rezultas nobla konkurado. En la multlingva kongreso certe troviĝos uzantoj de Esperanto, ĉar jam pluraj kolektantoj korespondas ĉi-lingve kun siaj interŝanĝ-kunuloj.

Dr. Andor Semsey

Béla Balázs

Baldaŭ aperos nova eldonaĵo de la Hungara Esperanto-Asocio, kun sepkoloraj ilustraĵoj: SEP REĜIDOJ de *Béla Balázs*. Tiu sprita, kontraŭmilita „fabelo" (verkita en 1916), kune kun aliaj similtendencaj fabeloj, poemoj, prozaĵoj provokis koleron de la tiamaj ŝovinistoj, akraj disputoj leviĝis kontraŭ tiu mildanima, pacema poeto. La konservativa, postrestinta hungara klasa socio bone sentis, ke en la novtendenca, ofte vuale simboleca enhavo kaŝas sin ribelema animo. Antaŭ kaj dum la unua mondmilito la mizera stato de la hungara socia strukturo, la pezaj antinomioj, la popolmizero, igis revoluciemaj multajn, kiuj arde sopiris je la pli bona, pli justa vivo. La maldemokrata, subprema regado de aristokratoj kaj milionuloj ricevis bruligan ĥon en verkoj de Ady kaj aliaj junaj verkistoj, inter ili Béla Balázs. Realo kaj senmistika fea mondo kunfandiĝas en liaj poemoj simbolismaj, ankaŭ en liaj dramaj ludoj, el kiuj du estis prenitaj de *Béla Bartók* por muzikigo sia *(Blubarba princo,* opero kaj *Reĝido skulptita el ligno*, baledo). La modernaj problemoj ĉiam incitis lian verkemon, tial en lia frua dramo temas pri la tiam nova fenomeno, virino-diplomito, doktorino.

Estas tamen malfacile ellevi iun flankon de tiu multfaceta verkisto, partoprenanto ankaŭ en la publika vivo, kaj eble la unua grava filmteoriisto, kies libroj estis tradukitaj en multaj landoj por eduki novajn filmistojn. El lia bunta, movplena vivo reliefiĝas mildkaraktera, sed energia viro, luktanta en pluraj landoj, post kiam li devis forlasi la amatan patrujon.

Fine de la mondmilito, en 1918/19 feliĉe interplektiĝas lia homa evoluo kun la socia transformiĝo.

Sed la imperiismaj armeoj venkis, kaj faligis la unuan hungaran popolan ŝtaton, Balázs devis vivi en elmigrado. Vieno, Berlino vidas lin dum jaroj en siaj literaturaj rondoj, poste Moskvo.

La liberiĝintan landon li jam maljune revidis, kaj tuj verkis la filmlibron de la internacie grandsukcesa filmo: „*Ie en Eŭropo*", pri la postmilite vagantaj infanoj. Pro meritoj literaturaj li ricevis Kossuth-premion antaŭ lia morto. Novaj kaj novaj eldonaĵoj de liaj poeziplenaj verkaĵoj sekvas, lia nomo estas menciata inter la grandaj klasikuloj de la filmarto. Estas inde, ke la esperantista publiko nun konatiĝos, tra la eldonata libreto, kun tiu amplena, tutkora homa homo.

Ervin Fenyvesi

Juneco, juneco

Ĉu kvanto aŭ kvalito?

De tempo al tempo reaperadas en la laborplanoj de TEJO kaj de la Landaj Sekcioj la nova, pli intensa varbado. Kaj fakte, la varbadon ni komencas ĉiujare per afiŝoj, flugfolioj, konigante nian lingvon, niajn celojn kaj ideojn. Kaj ni kutime sukcesas gajni multajn novajn kursanojn. Sed . . . ni elspezas multe por tiu ekstera propagando, kaj la plejparto de la kurskomencantoj forlasas la kursojn post 6—7 lecionoj (ne grave, ĉu la instruometodo aŭ io alia estas ties kaŭzo). Restas ĉ. 45%oj, sed ankaŭ el tiuj malaperas multaj: ili retiriĝas de la movado. Okazis, ke el 500 novaj kursanoj, anonciĝintaj por la komenca kurso, nur 25 prezentis sin por kurso daŭriga. Perdo de 95%-oj!

Ties kaŭzo povas esti nur la manko de interna propagando. Ni devas pli multe okupiĝi pri la ellernintoj de la lingvo. La plej bona rimedo por tio ŝajnas la viglaj junularaj kluboj, se tie, kun helpo de kapablaj junuloj, oni povas aranĝi variajn programojn, ligi internaciajn kontaktojn. Ni multe gajnus, se parton de niaj propagandelspezoj ni dediĉus al la interna propagando.

En la lastaj jaroj pli kaj pli laŭtas la demando, kiel akiri grandajn amasojn por nia movado. Sed, laŭ mia opinio, pli multe ol tiaj amasoj disperdiĝantaj valoras forta, altkvalita bazo. Ĉu kvanto aŭ kvalito? Nepre ambaŭ per la altigo de la lingva nivelo de la malnovaj anoj kaj per ilia partoprenigo en nia movada-societa vivo. Nur kvalita kvanto povas esti efika!

Flóra Szabó

NIA HUMORO

Mari Jászai, la granda hungara aktorino rolis foje gaste en provinco. Dum la provoj plurfoje ŝi admonis mishumore mallertan aktoron, kaj fine lin atakis kun la demando:

— Kial vi, entute, fariĝis aktoro?

— Ĉar mi sentis inklinon al la mondo-signifaj tabuloj de la sceneja planko, — respondis la aktoro kun malkara patoso.

Mari alkriis lin brov-kuntire kaj kolere:

— Kial do vi ne fariĝis lignaĵisto?

*

Ferenc Molnár, la grandsukcesa dramverkisto, edzinigis en 1922 Saran Fedák, la plej faman aktorinon de tiuj tempoj. La dramverkisto nomis tion „adiaŭ-edziĝo"; tiam ilia interrilato daŭris jam de sep jaroj. Li aperis antaŭ la matrikulisto en simpla strata vesto. Iu lia amiko rimarkis:

— Mi ne komprenas vin, Fraĉjo, kial vi ne venis en frako aŭ en ĵaketo?

Ferenc Molnár respondis sen palpebrovibro:

— Mi vestas min parade nur por premiero.

*

Frigyes Karinthy, verkisto konata ankaŭ de la Esperanta mondo, edziĝis duafoje al eksedziniĝinta virino kaj per tio li trafis en iom komplikitan familian vivon, ĉar kaj li kaj lia dua edzino havis infanon el la unua geedzeco, kaj krome al ili naskiĝis ankaŭ komuna infano. Foje la tri infanoj interbatiĝis pro io, kaj Karinthy, kiu ĝuste laboris, jene petis la edzinon pri faro de ordo:

— Aranka, mi petas, faru jam pacon: via infano kaj mia infano batas nian infanon.

Ĉu estas bone, se frue geedziĝas gejunuloj?

Estas konsilinde priatenti statistikon: la proporcio de edziĝintaj viroj sub la aĝo de dudek kvar jaroj estis 28,5% en 1938 kaj 45,9% en 1961. Pri la socia efiko de tio d-ro Tibor Papp, universitata profesoro pri familia juro, deklaris al la centra partia ĵurnalo Népszabadság:

Antaŭ la milito la junuloj ne edziĝis antaŭ la 25—26-a jaro pro financaj pripensoj. Nuntempe la financaj pripensoj havas minimuman rolon. Tio estas kaj bona kaj malbona. La nematerialeco de la junaj geedzoj originas nature ankaŭ en la pli libera pensmaniero, en la malpliiĝo de sociaj konvencioj, sed ankaŭ en tio, ke ili plej grandparte ne esperas ricevi loĝejon, ĝis ili atingos la 23-an, 25-an jaron.

Tio, ke iusence sen respondeco, tro facile ili geedziĝas, komencas havi konsekvencojn, kiam aperas la infano. Tiam iĝas malvasta la subluita loĝejo, aŭ la loĝejparto, transdonita de la gepatroj.

Laŭ mia opinio, biologia edziĝmatureco ankoraŭ ne signifas socian edziĝ-maturecon. El la geedzoj tro junaĝaj multaj eksedziĝas. En preskaŭ ĉiu tria edzeco la edzo aĝas sub 29 jaroj.

Kongreso en Vieno

Post jardekoj denove Vieno estos la urbo de UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO. En la jaroj 1924 kaj 1936 ni ja kongresis en tiu belega Danubvala metropolo. La unua kunveno estis impona ankaŭ laŭ la nombro de aliĝintoj, la dua pro la ne favoraj cirkonstancoj ĉi-rilate estis iom pli modesta.

Estas konate, ke la Esperanto-movado ankaŭ en Aŭstrio plifortiĝas. Estas speciala avantaĝo por ni ĉiuj, ke la honora protektanto de la *55-a U. K. estas la Federacia Prezidanto de la demokratia respubliko Aŭstrio, sinjoro d-ro h. c. Franz Jonas*, mem eminenta samideano, kiu pli frue dum multaj jaroj estis ankaŭ urbestro de Vieno. Ni citas el la bonvenigaj vortoj de la nuna urbestro s-ro Bruno Marek.

„Kiel urbestro de la urbo Vieno mi ĝojas, ke la Aŭstria Esperantista Federacio invitis la Universalan Esperanto-Asocion, aranĝi la 55-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 1970 en Vieno. Kiel mondfama kongresurbo kaj kiel konstanta sidejo de gravaj internaciaj institucioj, Vieno povas doni la taŭgan kadron por mondkongreso eminenta. Ĉe la multaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj jam okazintaj en Vieno, ĉiam denove montriĝis, kiel ĝene efikas, ja devas efiki la nuntempa multlingveco dum la procedo de tiaj aranĝoj.

Pro tio estas tre dankinda tasko, al kiu sin donis la Universala Esperanto-Asocio kun siaj aliĝintaj asocioj, nome doni al la mondo unuecan internacian lingvon kaj helpi tiel forigi aŭ malgrandigi la ekzistantan lingvan ĥaoson en internacia rilato. La 55-a Universala Kongreso de Esperanto alportos, kion mi sincere deziras, grandan paŝon antaŭen en tiu direkto. Mi do deziras al tiu ĉi kongreso plenan sukceson en ĝiaj malfacilaj laboroj, kiuj gvidu al pliboniĝo de la internacia kompreniĝo inter popoloj kaj homoj."

Estas superflue ankaŭ ĉi tie konigi la kongreslandon kaj urbon, kiuj estas konataj dise en la mondo pri la beleco de naturo, kaj tiu de siaj konstruaĵoj, historiaj monumentoj. Krom tio ankaŭ pro ĝia kultura vivo ĉefe en Vieno — urbo de la muziko — kiu ĉiam rezervas ion agrablan por la vizitantoj. Ĉiloke ni deziras sincere al nia kara najbaro grandan sukceson kaj diras per la aktuala saluto de la esperantistoj: ĝis revido en Vieno! . . .

I. *Bácskai*

Hungaraj medicinaj instrumentoj en 35 landoj

En 35 landojn estas eksportataj hungaraj medicinaj instrumentoj kaj instalaĵoj. Ties fabrikado estas nova, evoluinta nur ekde 15—20 jaroj. En la Fabriko MEDICOR jam pli ol 6000 laboruloj produktas la instrumentojn, kaj en ĝia aparta instituto 800 esploristoj kaj teknikistoj okupas sin pri fakaj esploroj. La lastjara eksporto de la entrepreno atingis 1,5 miliardojn da forintoj! MEDICOR staras jam sur la sesa loko inter la grandaj firmoj eksportantaj X-radiajn aparatojn

El inter la novaj produktaĵoj estu prezentataj kelkaj altnivelaj instrumentoj, unue la *radioskopia aparato*, funkcianta per 3-faza logika cirkvito. La *elektronika direktado* ebligas modifi la bildfaradon laŭ individuaj ecoj de la paciento.

Internacian furoron atingis la moderna *sangglobeto-komputilo* tute aŭtomata; ankaŭ la licencon aĉetis jam diverslandaj firmoj. La staton de la pacientoj en hospitaloj ebligas daŭre kontroli la nova *elektronika kontrolsistemo*. Ĝi observas funkciojn de organoj samtempe ĉe ses pacientoj kaj sendas la signojn eĉ tra 100-metra distanco.

Kvarcradiado estas jam ofte amase aplikata. Tie estas utilaj la novaj modernaj *impuls-ultraviol-lampoj*, mallongigantaj la traktadon je 3—4 sekundoj (kutime 3—10 minutoj!). La novtipa *aer-jonizatoro* malpliigas langvoron de homoj estantaj en fermitaj ejoj. Ties interesa varianto estas aplikebla ankaŭ en aŭto, kie la laca ŝoforo rapide freŝiĝas post la ŝalto.

Inter la specialaĵoj estas menciinda precipe la novtipa operacia *suturonadlo* (t. e. por ligo per kirurgia fadeno), aplikebla eĉ ĉe la plej sentemaj organoj, ĉar tiu specifa nadlo ne malutilas histojn. La sama teknokologio estas adaptita ankaŭ ĉe la injektiloj unufoje uzeblaj, kaŭzantaj nenian detruon de histoj.

Plurmil specoj kaj variantoj de medicinaj instrumentoj kaj instalaĵoj estas produktataj en la Fabriko MEDICOR, kaj inter ili ĉiam pli signifa estas la fabrikado de *kompletaj sanitaraj instalaĵoj* — kompletaj hospitaloj, ambulancoj, operaciejoj. El la fabriko eliras plurspecaj *rulataj* ambulancoj, laboratorioj, eĉ iksradiaj esplorejoj sur veturiloj. Ĉi lastaj kapablas veturi sur diversaj terenoj, en senvojaj marĉaj, dezertaj aŭ montaraj regionoj. Brasilo mendis *ambulanco-ŝipon kontraŭ epidemioj*, destinitan por profilakto kaj neniigo de epidemioj apud Amazono.

En la lasta jaro komenciĝis fabrikado de kompletaj modernaj kosmetikejoj kun ĉiaspecaj beligaj instalaĵoj kaj instrumentoj. La hungara fabriko verŝajne ĉijare jam prezentos tiun novan varon en la mondmerkato. En tiuj kosmetikejo kuracisto-specialistoj povas fari ankaŭ plastikajn operacietojn.

Trad.: E. Fenyvesi

INTERPRESSGRAFIK

„Interpressgrafik", la unua socialisma grafik-revuo internacia, estis prezentita en Domo de Hungara Preso. Ĝi aperas kvaronjare, prizorgate de Internacia Ĵurnalista Organizaĵo. La prezentita numero estas la dua; la unua aperis en Praha. De nun ĉiu numero aperos en Budapeŝt; ilin presos la presejo Kossuth.

La tri redaktoroj de la revuo, Jaroslav Kopriva, René Murat kaj Tibor Szántó' tenis gazetar-informadon, kaj rakontis, ke la revuo, koncerne siajn celojn, estas unika en Eŭropo. Similaj eldonaĵoj aperas ja en Svislando kaj en Okcidenta Germanio, sed ili prenas multe pli strikte la nocion de la grafiko kiel artospeco. La revuo „Interpressgrafik" prezentas la nunajn direktojn de la aplikita grafikarto kaj ties kulturantojn, sed krome konigas ankaŭ la grafikan projektadon, situacion de la presproduktoj, kaj ankaŭ la plej modernajn metodojn de la prestekniko. La revuo estas destinita por grafikartistoj, ilustraĵ-redaktoroj, enpaĝigaj redaktoroj, fotoartistoj, libroprojektantoj, industriaj kaj komercaj entreprenoj, propagandfakuloj de institucioj, sed krom la strikta-sencaj fak-rondoj ĝi diras multon riĉenhavan ankaŭ al tiuj, kiujn interesas la presejaj kaj grafikaj produktaĵoj. La teksto de la revuo estas angla, sed aldone troviĝas ĝia kompleta hungara traduko.

Ĝi havas, sur okdek paĝoj, plurcent nigrajn-blankajn kaj kolorajn ilustraĵojn, kaj vekis jam ĝis nun grandan interesiĝon en internaciaj rondoj.

Korespondi deziras

En ĉi tiu rubriko ni presas nur anoncojn de niaj abonantoj

S-ro Arne *Bengtsson*, Abybergsgatan 32, MÖLNDAL, Svedio, dez. kor. kun kolektantoj kaj kun konantoj de la Esperanta literaturo.

S-ro Josef *Chvosta*, Engelsova 289. II. 22., PODEBRADY (Nymburk), Ĉeĥoslovakio, serĉas kontakton kun esp-istoj, kies profesio estas edukado de mensmalfortuloj al metioj.

El la urbo KOLOMNA, Moskva regiono, Sovetunio, dez. kor. kun ĉ. l. f-inoj Natalja *Roŝĉina* (mezaĝa instruistino de antikva historio) str. Karla Libkneĥta 34a—67, pri antikva historio, arkeologio, arto kaj vivo, Nina *Loŝmanova* (18-jara), vilaĝo Parfentjevo (ĉe Kolomna), Julja *Kotova* (18-jara), str. Karla Libkneĥta 25, kaj s-ro Viktor *Jerŝov* (20-jara) str. Studenĉeskaja 21, (ĉiuj tri gestudentoj de la franca lingvo) pri ĉ. t.

LETERKESTO

AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ. Ni ricevas ne malmultajn leterojn de niaj afablaj legantoj: ili jen laŭdas jen kritikas nin. Ĝis nun la laŭdoj superpezas, eble pro tio, ke oni pli senĝene skribas agrablaĵojn ol ties malon. Sed nun ni rekte vin petas, ke vi ne ĝenu vin: kio en via koro, tio estu en la letero. Aliflanke, kio nin plej ĝojigus, tio estus ne simpla laŭdo aŭ skoldo, sed konsiloj. Ni dezirus, ke vi helpu redakti nian revuon per viaj rimarkigoj kaj pretendoj. Ni petas ekzemple deziresprimon pri tio, kion vi legus prefere en la revuo, ĉu:

1. mallongajn literaturajn skizojn, kiuj jam pro sia amplekso estas malpli signifaj, aŭ pli longajn, 4—5—6 paĝajn novelojn, po unu en ĉiu aŭ ĉiu dua numero;
2. literaturajn verketojn en la strikta fikcia senco de la vorto aŭ prefere sociografiajn raportaĵojn pri la vivo de la diversaj popoltavoloj en nia lando;
3. kulturajn raportaĵojn, konigon de diskutoj, kiuj nuntempe okupas la hungarajn literatorojn, sociologojn, kritikistojn, teatro- kaj kino-fakulojn;
4. raportojn pri hungaraj novaj teatraĵoj kaj filmoj prezentataj;
5. portret-raportojn pri hungaraj famuloj de la kultura vivo;
6. problemojn de la hungara ekonomio, ktp. ktp. — vi povas mem daŭrigi ĉi tiun liston kaj elekti la preferaĵojn.

Ni opinias, ke tia kunlaboro de redakto kaj legantaro devas multe utili al nia revuo, do al vi kaj ni ĉiuj. Ne malfruu do!

Kun antaŭdanko: *H. V.*

Al s-ro Zoltán Marenĉin, en Preŝov, Ĉeĥoslovakio. — *Ni tre bedaŭras Vian indignon pro la esperantigitaj personnomoj en la artikolo „Jókai nuntempe" (n-ro 4./68.). Niaopinie estas rajto de ĉiu esp-isto uzi aŭ originalan personnomon aŭ tradukitan — se tia ekzistas. Ĉu Zamenhof, Baghy kaj multaj aliaj ne uzis Esperantigitan personnomon? Kompreneble ankaŭ la malon ni povas vidi: Edmond Privat, Ferenc Szilágyi ktp. Estus troa ortodoksemo antaŭskribi striktajn regulojn tie, kie minacas nenia danĝero la kompreneblecon. Tamen, se rekoni la veron, ĝenerale oni jam ĉiam pli uzas la naciajn formojn de la tradukeblaj personnomoj, al kio ne malmultgrade kontribuas ankaŭ la naciaj sento kaj konscio kaj aliparte la ekzemplo de la ĉiam pli multiĝantaj netradukeblaj nomoj en la Esp-a literaturo.*

Ankaŭ la formoj „oĉjo, paĉjo, panjo" ne plaĉas al Vi. Vi trovas ilin formoj „mieldolĉaj kiel la lakta kremo". Tiuj sufiksoj estas fundamentaj. Ne uzi ilin ĉiu havas la rajton. Sed malaprobi ilian uzon en iu ajn verko, tion ni ne trovas laŭcela nek akceptebla.

*

Departementa Komitato de Esperanto Miskolc. — Ni dankas vian gratulon, kaj viajn rimarkojn ni klopodos utiligi.

*

Leopoldo Mokker, *SUBOTICA*, Jugoslavio. — Interesa estas Via rememoro, kiun Vi sendis al ni pri Via partopreno en la bataloj de la hungara ruĝa armeo. Ankoraŭ pli interesa estas, kiel Vi konatiĝis kun Esperanto dum tiu periodo de Via vivo. Via trupo estis loĝigita por mallonga tempo en unu el la lernejoj de la urbo Hódmezővásárhely. Tie, en la instruista ĉambro Vi kaj kamaradoj trovis afiŝeton alvokantan lerni Esperanton. Via tiama renkonto kun Esperanto estis definitiva, ĉar — kiel Via skribaĵo pruvas — Vi fariĝis tre lerta uzanto de la Internacia Lingvo.

Ni dankas Vian rememoron. Por la publikigo ni jam ne havis spacon en nia revuo, ĉar memore al la 50-jara jubileo de la Hungara Konsilantara Respubliko ni jam publikigis la rememorojn de s-ano P. Balkányi en la unua numero.

D-ro Géza Bárczi Kossuth-premiita akademiano, univ. profesoro en Budapesto, honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, okaze de la 25-jara jubileo de nia liberigo el sub la faŝismo, estis distingita per Stata Premio de plej alta grado.

Monda sukceso de la hungara GLYPONDIN

La fabriko CHINOIN kaj unu el la plej grandaj medikament-fabrikoj de Francio faris kontrakton pri licenco, laŭ kiu la franca entrepreno provizos Francion kaj parton de la evoluantaj landoj per la plej nova produktaĵo de Chinoin: per *Glypondin*, havanta la plenan ŝancon fariĝi mondmarko. Esploristoj de Chinoin sukcesis eleksperimenti tian kemian kombinaĵon, kiu havas, ĉe la furaĝado de bestoj, ĉiujn utilojn de la antibiotikoj, sen ties malavantaĝoj. Glypondin ne estas bakterio-mortiga kaj tiel rapide eliĝas el la besta organismo, ke ĝi jam ne ĝisvenas en la homojn, kiuj konsumas la best-produktaĵojn. Aliflanke, la bestoj kreskas de ĝi pli bone: la bovoj, porkoj, ŝafoj kaj kokidoj fariĝas pli frue buĉmaturaj. Ankaŭ la pezon de fiŝoj ĝi pligrandigas. La abeloj produktas 30 procentojn pli da mielo kaj vakso, se ili estas nutrataj per manĝaĵo miksita per Glypondin.

La inventinto de la dinamo

Antaŭ 170 jaroj, en 1800 naskiĝis Ányos *Jedlik*, unu el la plej eminentaj fizikistoj de la XIX. jarcento. Li konstruis en 1828, longe antaŭante la alilandajn fizikistojn, la unuan elektromotoron, kaj en 1861 la dinamon. Li sukcesis la unua kontinue rotaciigi elektromagneton.

Lia motoro, praulo de la hodiaŭaj, ankoraŭ ekzistas, eĉ funkcias! Li faris ĝin kvin jarojn antaŭ ol *Saxon*, al kies nomo ligas la scienchistorio la unuan elektromotoron, konstruis la sian. En 1848 Jedlik partoprenis en la hungara liber-milito kontraŭ la Habsburgoj, kaj post ties malvenko li estis submetita al polica-prokurora procedo.

La ĉefverko de lia vivo estis la tute preciza kaj klara koncepto de la dinamoprincipo, en 1856. Ronde per dek jaroj li antaŭis per tio la germanan *Siemens*, al kiu oni ĝenerale atribuas la inventon de la dinamo.

Finnugra kongreso en Tallinn

En la ĉefurbo de Estonio faros en 1970 la finnugraj lingvistoj sian kongreson ĝis nun plej grandampleksan kun 300 prelegoj sur la tagordo, precipe de finnoj kaj hungaroj. Ĉeestos lingvistoj el 22 landoj, interalie el Svedio, Norvegio, GDR, GFR, Usono, Francio, Italio, Mongolio, Britujo.

GLOSARO:

dista: distanca
komputero: kalkulmaŝino
lila: violkolora
premiero: unua prezento de teatrajo
rehabiliti: ree laborkapabligi (kriplulon);

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. – Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,–

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A–1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A–1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168–174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14–22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH.
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. – dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. – dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD.
Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3–4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30–19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112–a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7–9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21–105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!

Citajo el poemo
de
ENDRE ADY
(en traduko de EMBA)

ENIGMO DE FERI



Sendu al ni la tri versojn de l'citaĵo. Inter solvintoj ni lotumos kvar premiojn.

Horizontalaj vicoj:

(Literduoj horizontalaj: RT, AN, SF, OL, PD, AS)

1. Unua vico de la citaĵo
13. Signo de venko, militakiraĵo, memoro pri ĉasado 14. Pedagogia agad' 15. Japana feŭda nobelo 16. Ŝildon de greka diino Palaso 17. Duono de Ameriko! 18. El defenda parolo aŭ skribaĵo (prepozicio kaj vorto) 20. Ŝtona, ligna aŭ fera trab', blok', horizontale metita sur la fostoj de fenestro aŭ pordo 22. Esprimi amon per lipoj 23. Vortradiko de infinitivo: sciigi pervorte 24. Samspecaj literoj de la vorto: fripono 26. Nomdono (mankas la unua litero) 28. Astr' 30. Amfibia, saltanta best', el la familio de senvostuloj 32. Latva poetino esperantista (baptonomo staras malantaŭe) 35. Sudafrika lando 37. Denove 38. Estanta el valora metalo 40. Kemia elemento, metalo 41. Materio de vivuloj kaj fruktoj 43. Inverse: denove 45. Kemia simbolo de Karbo kaj Samario 46. Vira voĉ' inter baso kaj tenoro 48. Botanika kaj zoologia sufikso por formi la nomon de familio 50. Returne: ekzisti, vegeti 53. Mondpaca Esperanto Movado 55. Adjektiva sufikso, esprimanta plej altan gradon 57. Nomo de aŭtoro de „Vojaĝo al Kazohinio" (mankas iu supersigno, en la lasta kvadrato komenclitero de baptonomo) 58. . . .umo: kemia elemento, gaso 59. Speco de senpetalaj du-kotilenodoj, kun folioj pikantaj 62. Lukt', en kiu la partoprenantoj havas saman ŝancon (du vortoj) 64. Ega plezuro 65. Maldolĉan 67. . . . verso estas: refreno 68. Inverse: monunuo de USONO 69. Taĉment' mara (kunmetita vorto)

Vertikalaj vicoj:

(Literduoj vertikalaj: UO, UD, OL, ŜE), 1. Komenelitero: V

2. Eŭropan landon 3. Geologia formacio de la sekundara epoko 4. Difekti, disigi perforte 5. Ĉefurbo de balkana ŝtato (kun manko de la unua litero) 6. Nova, antaŭe neuzata vorto aŭ esprimo 7. Ŝtatestr' 8. Lingvoj propraj al iu nacio aŭ provinco 9. Sin amuz', sin distr', por nura plezuro 10. Inverse: sur iu parto de la spaco 11. Id' de besto nomata sub 30. horizontala 12. Soldatar' 15. Dua verso de la citaĵo 16. Afrika lando 17. Patrolando- se mankas la unua litero — 19. Kemia simbolo de Oksigeno kaj Galiumo 21. Inverse: la alia nomo de Pelin, bulgara verkisto 25. Aŭtoro de „Tragedio de l'homo" (mankas supersigno) 27. Difekto al ŝipo, aŭ al ĝia ŝarĝaĵo 29. Romia imperiestro (37—68 p. Kristo) 30. Granda ŝton' 31. Angla admiralo, venkinto ĉe Trafalgar 33. Malvera opini' 34. Ricevis impreson 36. Inverse: turka gren' 39. Originala nomo de aŭtoro de „Abismoj" (Jean Forge) 41. Rang' oficira 42. OOD 44. Motoro de spacveturilo 47. Tranĉi per denta klingo 49. Kiu devigas forlasi la lokon 51. Sencele iradi de loko al loko 52. VHL 53. Atmosfera fenomen' nekutima 54. La lasta verso de la citaĵo 56. Insekto kaŭzanta skabion 58. Le . . . — granda havenurbo en Francujo 60. Fera oksid' 61. Inverse: idealo de kavaliroj 63. Ĉe la fino kun — o: itala karesnomo 66. Ekstrema flanko de iu tuto, ekz. de orelo, konstruaĵo, armeo, ktp.

FILATELIO

Fine de novembro 1969 aperis poŝtmarkoj de ok prezoj el la serio „La konkero de la Luno"; ĝin projektis Sándor Bégrády.

La pecoj laŭ valoro estas: J. Verne: Vojaĝo en kaj ĉirkaŭ la Luno; imagita parto el la romano (40 heleroj). — Plano de Ciolkovskij pri kosma stacio el 1903 (60 heleroj). — „Luna 1" en lun-proksimo en 1959 (1 Forinto). — „Ranger 7" serĉas lokon de descendo en 1964 (1.50 Ft-oj). „Luna 9" alvenas la Lunon en 1966 (2 Ft-oj). — Kosmoŝipo „Apollo 8" ĉirkaŭ la Luno en 1968 (2,50 ft-oj) — Kosmoŝipoj „Sojuz 4" kaj „Sojuz 5"; ilia interkroĉo en la kosma spaco en 1969 (3 Ft-oj). — „Apollo 10" faras ĉefprovon de Lun-atingo en 1969 (4 Ft-oj).

En decembro aperis la serio „Pentraĵoj VII.", prezentanta kreaĵojn de Nederlandaj pentristoj. La poaj valoroj: Antonis van Dyck: „Sankta Johano Evangelisto" (40 heleroj). — Pieter de Molyn: Pejzaĝo kun kampuloj (60 h-oj). — H. Ternbrugghen: „Pip-ekbruliga knabo" (1. Ft.). — Jan Steen: „Kat-familio", parto (2 Ft-oj). — Pieter de Hooch: „Damo leganta leteron" (3 Ft-oj). — Dirk Hals: „Societo amuziĝanta subĉiele" (4 ft-oj). — Frans Hals: „Portreto de pentristo J. Asselin" (5 ft-oj). — La serion kompletigis en januaro la bloko prezentanta la kreaĵon de P. Rubens kaj A. van Dyck: „Mucius Scaevola Porsenna". — La serio estas inda daŭrigo de la ĝis nun aperintaj pentraĵ-poŝtmarkoj kaj konsiderinde riĉigas la hejman muzeon de la kolektantoj. La interesaĵo de la pentraĵ-serio estas, ke sur ĉiuj oni vidas reprodukte tiajn pentrajojn, kiuj troviĝas en enlandaj muzeoj aŭ ĉe hungaraj privataj kolektantoj.

Edit Rózsa



medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

TANNIMPEX

Eksportas la hungarajn ŝuojn de eminenta kvalito,
elegantajn peltmantelojn
kaj unuaklasajn, laŭmodajn gantojn
kaj led-galanterivarojn

TANNIMPEX

BUDAPEST, VI. VÖRÖSMARTY UTCA 35.